

Enhavo:

| | |
|--|--------|
| <i>Redaktora noto</i> | paĝo 2 |
| <i>La savita martestudo</i> | 3 |
| <i>Vojaĝraporto de Azar Karimi</i> | 4 |
| <i>Mi estas revemulo ...</i> | 7 |
| <i>Maŝino kontraŭ analfabeteco</i> | 8 |
| <i>Morala Menso kaj Kulturo</i> | 11 |
| <i>La birdo</i> | 15 |
| <i>Islamo kaj irananoj</i> | 18 |
| <i>Irana mond-heredaĵo</i> | 23 |
| <i>UK vojaĝraporto</i> | 25 |
| <i>Saĝe kaj Spirite</i> | 29 |
| <i>Floroj el "la florejo" de Sadio</i> | 21 |

53 Artikolo pri s-ro Bronislaw Geremek kaj liaj vidpunktoj rilate EU kaj lia esperantisteco kiun tradukis kaj prepares s-ino Behĝat Mamduhi.



43 Raporto pri la 90-a UK kiun skribis Reza Torabi kiel tagnoto koncize kaj ankaŭ fotoraportas.



50 Ahmad Reza Mamduhi atikolas pri G. R. Talkin kaj lia mondfama verko "Majstro de Ringoj". La aŭtoro priskribas emon de Talkin pri kreado de diversaj lingvoplanoj kaj lia opinio rilate Esperanto.



39 "Serĉado de la plena lingvo" Ahmad Reza Mamduhi al la legantoj klarigas vidpunktojn de Umberto Eco itala sciencisto pri lingvaj aferoj.



47 "Neceso de multlingvismo" artikolo tradukita de la fama franca revuo La Monda diplomatio kiun ni prenis de la persa versio surreta kaj iom laŭ lingvajo modifies por niaj perslingvaj legantoj.



35 Raporto pri la 90-a UK kaj la kongreslando kiun faris Bijan Zereŝkian.



Venontnumere vi legos:

Nuntempa persa poeto
Ahmad Reza Ahmadi, kinema poeto

Pajam-e Sabza ndiŝan (Mesaĝo de Verdpensuloj)

ISSN 1728-6174

IRANA ESPERANTISTO estas kultura kaj sendependa sezon-revuo internacia kiu presiĝas en Irano E-e kaj perse.

IRANA ESPERANTISTO

Respondeca direktorino :

Fariba N. Maĝd

Ĉefredaktoro :

M. Reza Torabi



Kovrilo:

Pri la artikolo Irano kaj Islamo

Persa kovrilo:

Temas la raporton de la UK

Grafikaĵo: *Babak Torabi*

Eldonaj aferoj: *Reza Haĝihasanlu*

Eksterlanda abono: *Hamzeh Ŝafti*

Adresoj:

✉ P.O.Kesto 17765-184,

Tehran, Iran

☎ (0098 21) 88348929

☎ (0098 21) 88348928

TTT-ejo : www.sabzandishan.com

Retpoŝto: info@sabzandishan.com

Bonvenas eseoj, artikoloj, raportoj kaj kontribuoj kondiĉe ke ili ne estu publikigitaj antaŭe. Bonvenas kulturtemaj kontribuoj ĉu en Esperanto ĉu en la persa.

Ĉia presa aŭ elektronika ĉitado aŭ eldonado de materialoj de IRANA ESPERANTISTO, ĉu originale ĉu tradukite en aliajn lingvojn, estas permesata. Bonvole menciui pri la fonto kaj la originala lingvo (t.e. Esperanto aŭ la persa) kaj se eble, informu nin pri eldonaĵo en kiu aperis io de aŭ pri IRANA ESPERANTISTO aŭ/kaj sendu kopion al ni.

Estimataj legantoj!

Ĉi-foje nia revuo aperas en ne kutima ritmo pro diversaj kialoj. Ni esperas retrovi nian kutiman ritmon kaj rekompenci la okazintan prokraston nedeziratan.

Sincere dirite estas problemoj kiujn ĉiunumere ni devas trapasi kaj eĉ kelkajn preterpasi(!) por aperigi nian revuon.

Kultura movadumo en simem estas sufiĉe mon/ temporaba afero kies rezultojn oni ofte ne povas rekte senti sed malrekte aperas multaj agrablaj aferoj.

Aperado de nia revuo en simem estas neprofitdona afero kaj dank al tiuj gesamideanoj kiuj malavare subtenas mone aperadon de ĝi, sed apero de la revuo alportas multajn bonajn aspektojn kaj prestiĝon al nia movado ĉu nacinivele ĉu internacinivele.

Post 4 jaroj, nun mi konsideras ke al nia revuo malgraŭ ĝia merito mankas iu grava. Ni ne sukcesis prezenti nin al Esperantujo kaj ankoraŭ E-publiko ne sufiĉe konas nian revuon, multaj eksciante pri ĝia ekzisto miras kial ni ne varbadas pri ĝi ktp. Simple dirite, al ni mankas verbiloj kaj varbeblecoj!

Ni esperas tiuj kiuj jam ricevas nian revuon ili mem estu niaj varbantoj (se laŭ ili valoras la revuo) kaj prezentu la revuon al la publiko.

Bonan legadon!

La Red.



Kongresejo de la 90-a Universla Kongreso

La savita martestudo

Maljuna martestudino apenaŭ povis naĝi. Ŝi renkontis delfenino. La delfenino demandis: “Kien vi naĝas, mia amikino?” La keloniino respondis: “Al la malgranda insulo por ellasi miajn ovojn.” La delfenino: “Sed tie estos danĝera por viaj idoj ĉar ekzistas multaj malsataj kraboj, korvoj kaj aliaj malicaj bestoj. Kial vi ne iras al la granda insulo? Tie estas pli imuna.” La granda rampulino: “Mi scias ĉion sed mi ne kapablas naĝi al tiu pli fora insulo. Mi ne plu estas juna kaj ankaŭ fariĝis granda kaj malforta.”


Poste ŝi adiaŭis kaj daŭrigis sian vojon. Ŝi pene sukcesis atingi la celinsulon kaj borinte truon sur ties marbordo, ŝi ellasis siajn ovojn en la truon.

Pasis tempo kaj malgrandaj idoj komencis eliri el siaj ovojn kaj arde klopodi atingi la oceanon. Sed kiel antaŭe diris la saĝa delfenino, ekzistis multaj danĝeroj. Ruĝaj kraboj trovis

tiujn bestidojn taŭgaj manĝaĵoj. Nigraj korvoj konsumis multe da ili. Multaj el tiuj kiuj povis atingi oceanon, fariĝis viktimoj de kruelaj ŝarkoj. Nur malmultaj povis savi sin de danĝero-plena junaĝo.

Pasis jaroj kaj jaroj. Ĉiuj el tiuj iamaj martestudidoj jam forpasis, kelkaj pro malsato, kelkaj pro malsano kaj kelkaj pro kaptiĝo en la reto de fiŝistoj. Nur unu el tiuj gefratoj restis. Nun tiu ununura savito havas la aĝon de ĉirkaŭ 118 jaroj. Tiu verda besto esperas vivi longe kaj fariĝi la estro de ĉiuj bestoj en la oceano kaj tiam

ordoni ke grandaj fiŝoj ne manĝu la malgrandajn, fiŝistoj ne kaptu fiŝojn, homoj ne malpurigu la akvon kaj multe da aliaj esperoj. Pro tio ĝiaj amikoj nomas ĝin “Esperanto”.



Mia Vojaĝo al la Urbo de Sala Lago (Usono)

Ĉi-printempe Irana E-istino, D-rino Zahra Karimi, vojaĝis al Usono por ekonomia konferenco kaj ŝi ankaŭ kaptis la okazon por renkonti E-istojn. Jen ŝia raporto pri la vojaĝo:

Mi regule ricevas informojn de Monda Banko (World Bank) pri diversaj ekonomiaj trejnadaj kursoj en diversaj landoj. En Nov. 2004, mi ricevis informon pri interesa du-semajna kurso en Universitato de Utaho en Usono. La temo de la kurso estis: "Genro kaj Makroekonomio". Mi kompletigis formularon kaj petis partopreni en la kurso.

La kurso estis senpaga kaj havis financon helpon por aviadil-bileto, hotelo, manĝaĵoj, ktp. En la formularo mi akceptis pagi 1000 \$ por kovri parton de la elspezoj.

Pasis kelkaj monatoj kaj mi tute forgesis pri la kurso, sed mi ricevis formularon invitleteron, kiu anoncis akcepton de mia peto por partopreni en la kurso. Ankaŭ estis informo pri internacia konferenco post la kurso kie ni povis prezenti artikolon, se la temo de la artikolo estus konfirmita per speciala komitato.

Mi sendis al la ĉefo de la komitato mian artikolon. Feliĉe mia artikolo akceptiĝis. Do mi okupiĝis pri vizo.

La plej malfacila parto de mia vojaĝo estis viza proceduro. Telefone mi fiksis la daton de intervjuo en Usona konsulejo en Dubai; preparis multajn bezonatajn dokumentojn, kiujn mi devis montri kiel konfirmilo por mia reveno al Irano post la fino de la konferenco.

Mi petis de vojaĝ-agentejo por aranĝi Dubai-vizon kaj aviadil-bileton por mi. (Vizo de Dubai kostas ĉirkaŭ 90 dolarojn.)

En Usona konsulejo en Dubai estis multaj atendantoj je la 7:30 matene. Mi supozas, ke ĉirkaŭ duono de la atendantoj estis irananoj. Multaj irananoj aplikas por la vizo kaj ne povas ricevi ĝin. Do ili elspezas multan monon en Dubai vane.

Ni devis pasi multajn diversajn procedurojn (speciale sekurecaj aferoj) por atendi en la intervjuo ĉambro. Intervjuo estis mallonga (ĉirkaŭ 5 minutoj), la oficistino diris al mi ke vi ricevos la vizon, sed post 10 tagoj. Do mi denove devis vojaĝi al Dubai por ricevi mian vizon.

Mi devis kontroli la ret-paĝon de la konsulejo ĉiu-tage, ĉar kiam mia speciala numero estis konfirmita, mi havis permeson por ricevi vizon. Pasis unu monato, kaj mi pensis eble ili ne volas doni vizon al mi, sed finfine mia numero aperis sur la ret-paĝo. Denove mi ricevis Dubai-vizon kaj vojaĝis tien, kaj ricevis la vizon.

Antaŭ mia vojaĝo, mi skribis leteron al kelkaj esperantistoj en Usono kaj klarigis pri mia restado en Salt Lake City. Post kelkaj tagoj mi ricevis leteron de s-ro Charles Hall kiu invitis min al sia hejmo en Salt Lake City. En la 25a de Majo mi flugis al Usono tra Nederlando. En Amesterdam flug-haveno, usonaj oficistoj kontrolis ĉiujn pasportojn. Ili montris mian pasporton al kelkaj kolegoj kaj poste demandis la kialon de mia vojaĝo. Nia aviadilo havis prokraston en Amesterdamo pli ol 3 horoj. Kaj ĉiuj pacience sidis en aviadilo kaj diris nenion.

En aviadilo mi sidis ĉe irakano, kaj dum longa prokrasto kaj flugo ni parolis pri amikeco inter iranaj kaj irakaj popoloj malgraŭ la milito. Li estis usona civitano. Li migris al Usono dum la milito de Irako kontraŭ Kuvajto. Li donis min valoraj informoj pri vivo en Usono, speciale bonegaj informoj por aĉetado en malmultekostaj vendejoj!!

Kiam ni atingis al Detroit flughaveno, multaj pasaĝeroj facile montris pasportojn kaj

iris eksteren, sed kelkaj, certe mi estis inter ili, devis atendi en la oficejo de enmigrantaj aferoj. Mi plenis specialan formularon kaj ili denove demandis kelkajn demandojn, fingroprintis min kaj petis kiam mi volas lasi Usonon, denove certe atendi la oficejon de enmigrantaj aferoj.

Mi finfine atingis "Salt Lake City" la Urbo de la Sala Lago. Feliĉe studento de Universitato de Utaho estis en flug-haveno kaj ni kune veturis al universitata gastodomo. Salt Lake City estas bela urbo apud montaroj. La universitato situas inter la montetoj; similas al Beheŝti Universitato en Tehrano, sed pli bela, pli granda kiel urbeto. Granda lago estis videbla de la universitato.

Nia kurso estis bonega. Mi konatiĝis kun multaj ekonomiistoj de diversaj landoj. La temoj de diskutoj estis ege utilaj. Ili aranĝis interesajn ekskursojn en belegaj montaraj apud Salt Lake City. Mi prezentis mian artikolon "Ebleco de labor-kreado en kooperativoj en Irano". Estis bona sukceso por mi, ĉar multaj kolegoj interesiĝis pri labor-merkato kaj ni multe diskutis pri Irano. Usonanoj en la universitato havis amikajn rilatojn kun mi. Multaj bedaŭris pri malbona politika rilato inter du landoj. Mi ne vizitis profesorojn kiuj subtenis la politikojn de usona ŝtato en Irako kaj kontraŭ Irano.

En stratoj, trajnoj, vendejoj, aviadiloj, ... multaj usonanoj kiuj sciis ke mi estas iranano, amike parolis kun mi. Mi ne vidis signon de mal-amikeco kontraŭ Irano.

Dum mia restado, mi kontaktis esperantistojn. Oni invitis min al jara kunsido de usonaj esperantistoj en Teksaso en Junio 11, sed Konferenco en Universitato de Utaho estis ĵus en 11-13a de Junio, kaj mi ne povis vojaĝi al Teksaso. Mi kelkfoje parolis telefone kun D-ino Anĝelina Taremi, kiu estas iranano kaj aktiva esperantisto loĝanta en Arizono kaj havas Esperanto-domon tie.

Je la 14a de junio s-ro. Charles Hall venis al universitata gasto-domo kaj ni kune iris al lia hejmo. Estis unua fojo por mi viziti usonan familion en ilia hejmo. Estis simpla, sed bela kaj pura domo. Mi vidis lian edzinon kaj gefilojn kaj gebofilojn. S-ro Charles kaj mi vizitis la hejmojn de kelkaj esperantistoj en la urbo. (la foto montras s-ron Charles, esperantistinon kaj ŝian filon, kiu bone parolis esperanton kaj ŝian edzon.)

S-ro Charles estas murmuno. Murmuno estas interesa religio, kreita longa tempo antaŭ

krist-nasko, sed poste ili akceptis kristianismon. Murmuno havas riĉajn kaj gravajn preĝejojn en Salt Lake City kaj Utaho provinco. Ili sendas misiistojn al diversaj landoj, do oni facile rilatas kun fremduloj. Pro tio Charles interesiĝis pri lingvoj, kaj nun volas lerni turkan lingvon ankaŭ. Li montris min belegajn parkojn, muzeojn,... en la urbo. Ni ankaŭ vizitis irananon (Hassan) kiu loĝas apud lia hejmo. Do per Esperanto mi trovis bonegan oportunon por viziti usonajn kaj iranajn familiojn en Salt Lake City.

Mi forlasis la urbon de Sala Lago je la 16a de Junio. En flug-haveno oficiroj, vidinte mian pasporton, zorgeme kontrolis miajn aĵojn kaj eĉ ordonis min demeti miajn ŝuojn. La flugo de Salt Lake City al Memfis denove havis pli ol unu horon da prokrasto. Ni atingis al Memfis flug-haveno je la 7a ptm.

Mi devis atendi denove en la oficejo de enmigrantaj aferoj en Memfis flug-haveno. Kiam mi iris al la oficejo de enmigrantaj aferoj, neniu estis tie kaj la oficejo estis fermita. La respondeculo de flug-agentejo diris ke mi devas resti en flug-haveno por informi la oficejon pri mia forlaso. Sed mi ne povis ŝanĝi mian reven-bileton. Estis stranga afero, ke oni volas ricevi informon, sed la oficejo estas fermita!!

Mi decidis ne ŝanĝi mian bileton kaj mi daŭrigis mian flugon al Tehrano. Eble se mi volus denove vojaĝi al Usono, mi havos problemon!!

Entute mi ĝuis belecon, progreson kaj bonordon de Usono kaj speciale varman kaj amikan kontakton de multaj ordinaraj homoj. Ĉiam mi komparis la situacion de Irano kun Usono. Certe ili havas komplikajn problemojn rilate al junuloj, familioj, ktp, sed ili solvis multajn sociajn problemojn, kiuj ni en Irano ne klopodas solvi. Mi ankaŭ multe bedaŭris pri politikaj obstakloj kiuj malpermesas iranajn studentojn por studi en Usono. Mi vizitis multajn studentojn de Turkio, Tajlando, Ĉinio,... kiuj studis senpage por doktoriĝi, ili eĉ ne bezonis ricevi financan helpon de familio por kovri restadajn elspezojn. Ili mem povas havi enspezojn facile kun laboro en universitatoj. Rilate al Esperanto, certe Anĝelina estas bonega persono por aranĝi pli bonan rilaton inter irana kaj usona esperantomovadoj.

Zahra Karimi, 2a de Aŭgusto 2005

zakarimi@umz.ac.ir

Saĝe kaj Spirite

Enesperantigis: Morteza Mirbaghian

%99de advokatoj donas al la cetero malbonan nomon.

Steven Wright

Klara konsicenco estas signo de malbona memoro.

Steven Wright

Biero estas pruvaĵo ke Dio volas ke ni estu gaja.

Benjamin Franklin

Mi neiam vidis elektron, tial mi ne pagas por ĝi.

Steven Wright

۵۱

6

Unu nokton mi marŝis hejmen tro malfrue kaj fal-dormis sur la satelita telero de iu. Miaj sonĝoj estis ...tra la tuta mondo.

Steven Wright

Nur unu afero pli timigas ol diri la veron kaj tio estas ne diri la veron.

Naomi Wolf

Estis ja saĝa homo, tiu, kiu inventis bieron.

Plato

Nur du aferoj estas senfinaj, la universo kaj homa stulteco, kaj mi ne certas pri la lasta.

Albert Einstein

Metu vian manon sur varmega forno dum unu minuto kaj tio ŝajnas unu horon, kunsidu kun bela knabino dum unu horo kaj tio ŝajnas unu minuton, Jen relativeco.

Albert Einstein

Homo, kiu je la kvindeka jaraĝo vidas la mondon tiel, kiel li kutimis vidi ĝin je la dudeka jaraĝo, perdis tridek jarojn de sia vivo.

Muhammad Ali

Ŝirin Ebadi (Nobel-premiito por Paco): MI ESTAS REVEMULO

Refoje eksplodoj faritaj per teroristoj en Londono kaŭzis multe da diskuto en la amaskomunikiloj kaj inter opinio-influantoj pri la detrua forto de ekstremista religia kredo.

Mi multfoje priskribis mian konvinkigon ke nedemokrataj medioj subtenas individuoj sentema al ekstremista kredaro. Senigita je (voĉdon)rajto civitanoj ne estas altigita en toleremaj socioj, ne estas prosperitaj de propraj liberoj kiel libera penso kaj parolado. Homoj vivanta sub tirana regulo, ĉu estas religia aŭ politika diktatorado, multe pli vole akceptus ekstremistaj pensoj.

Se ĉi tiuj individuoj estus altigitaj en lando kun sana kaj demokrata registaro, se ili estus alkutimiĝitaj al esti aŭdataj tra justaj politikaj procedoj anstataŭ bomboj kaj komandaj taktikoj, eble la mondo estus sur bazo de malsama paradigmo. En sanaj demokratiaj socioj kie homaj postuloj estas plenumataj tra bonorda politika diskurso certaj membroj ne sentas neceson sin tumi al armiloj kaj terorismo.

Bonŝance, unuiginta fronto de antaŭenigajn pensantajn Islamanojn estas formit sen rigardi la politikajn landlimojn. Ĉi tiu estas antaŭsigno de libereco por Islamanoj de religia ekstremismo. Ĉi tiu movado ne havas nomon aŭ iu gvidanton, aŭ centra administro kun filioj. Ĝi loĝas en la koro de ĉiu Islamano kiu ne povas toleri maljuston kaj ne volas akcepti ĉiu nevalida

aserto kiel religia. Religiaj progresemuloj kies nombroj bonŝance estas plimultiĝanta en Islamaj landoj, defias la ekstremistojn. Kun logiko kiu estas ĉe la koro de religio ili pravas ke ĉiu ago de administrado, eĉ se ĝi asertas la nomon, ne faras ĝin Islama. Ili penas malhelpi la fitrakton de ilia religio per proklami ke Islamo kaj demokratio iras manon ĉe mano: ni povas esti Islamanoj kaj respekti demokration kaj homajn rajtojn ĉar nia religio estas sur baze de egaleco. Islamo estas kontraŭdirekte al diktatoreco kaj terorismo portita en la Islama mondo.

Meze de ĉiuj tumultoj en la Islama mondo, Mi havas revon. Mi revas de progresanta Islamo ke ne nur estas tute konforme al demokratio kaj homaj rajtoj, sed portas la flagon de ĉi tiuj valoroj tutmonde. En ĉi tiu revo, Mi vidas la unuecon de ĉiuj homaj koroj. tiom, ke ĉiu individuo sentas la doloron kaj suferon de alia kvazaŭ ĝi estas sia propra.

Mi estas revemulo kaj Mi kredas atingi niajn idealojn estas havenda parto de la homa historio kaj ĉiam estos tiel. Multe de tio, kion ni spertas nunepoke estas sur bazo de revo aŭ idealo.

Tradukis: Hamze Ŝafii

Fonto:

<http://www.ashena.com/modules.php?name=news&file=article&sid=266>

Desegnaĵo:


http://sicknick.org/archives/03/he_nobel_peace_prize_goes_to_iran.shtml



Ferejdun Tonkaboni (1937-), unu el la nuntempaj verkistoj de la persa, ne estas tute nekonata en Esperantujo. Almenaŭ traduko de unu el liaj noveloj aperis en la beletra gazeto Fonto antaŭ ĉ. 20 jaroj: Vojiri sur la Reloj far A.R. Mamduhi.

Maŝino kontraŭ analfabeteco

Nuntempa novelo satira



۴۹

8

Estis la jaro 2045 (1). La kampanjo kontraŭ analfabeteco estis tre forta kaj furora. La ŝtato dediĉis ĉiujn siajn budĝetojn ĉu militajn ĉu civilajn, kaj ĉu kaŝajn ĉu malkaŝajn al la batalado kontraŭ la analfabeteco. Policistoj anstataŭ bastono pendigis de sia zono gigantan krajonon, per kiu ili batis la kapon de tiuj, kiuj ĝenis la publikan ordon. La bajonetoj de la soldatoj uziĝis por pintigi kraĵojn. Oni plu ne punis per monpago, vipo, prizono kaj ekzekuto. Se aŭta kondukisto ne obeis la ruĝan lampon de semaforo, oni devigis lin eksidi ĉe la skribotablon de la plej proksima policejo, kaj kvincent fojojn skribi: “Mi plu ne malobeos ruĝan signalon de semaforo”. Fotistoj ne fotis analfabetojn kaj la Statistika Oficejo ne donis al ili transskribon de la identigilo. (Kvankam por enskribiĝo ĉe la kursoj kontraŭ la analfabeteco, oni postulis de ili kvar fotojn kaj du transskribojn de la identigilo.)

Kiam atendantaj en la vicoj por aŭtobusoj kaj taksioj, oni legis malkarajn, grandajn aŭ malgrandajn librojn, kiujn eldonis “Centro por Preparado de Legaĵoj por la Analfabetoj”. Tiajn librojn oni abunde trovis en razejoj, ŝuistejoj kaj atendoĉambroj de kuracistoj. La ŝtataj oficistoj anstataŭ unutagan salajron, memvole kaj kontente

dediĉis sian 30-tagan salajron al la sankta programo kontraŭ la analfabeteco, kaj poste, kolektive, kun siaj edzino kaj gefiloj, formortis, kaj la ŝtato por glori ilin aranĝis funebrajn ceremoniojn. Tiuj, kiuj havis liberajn profesiojn monigis ĉion sian kaj transigis la sumon en konton KM-7-7 (Kontraŭ-analfabeteca Movado laŭ la sepa sepjara programo). Ankaŭ ili formortis unu post la alia, kaj rekompence sepdek aŭtomobiloj, kiujn ili estis gajnintaj komune, postsekvis iliajn kadavrojn, kaj per sepcent menoj*(2) da oro kaj sepcent menoj da arĝento, kion ili akiris kiel premion, oni konstruis por ili grandiozan maŭzoleon, por ke ĝi estu pilgrimejo por la venontoj kiel la simbolo de sindonemo kaj sinofero.

Oni aranĝis konkurson por elekti poemon kiel frapfrazo de la Kontraŭ-Analfabeteca Asocio, kaj fine tiu ĉi verso venkis:

Da manĝaĵoj tenu malplena la internon

Por ke en ĝi de l' saĝo vi vidu la lumon (3)

Ekde tiam oni presis la verson sur ĉiujn paperaĵojn kaj lerneajn librojn, kaj oni grande skribis ĝin sur la murojn kaj por etemigi la kontraŭ-analfabetecan movadon en la historio de la lando, oni gravuris la verson tiel grandlitere sur la trunko de la Damavand-monto, ke ĝi tre facile legeblis de


la ĉefurbo.

Pro ĉio ĉi, logike plu ne devus ekzisti analfabeta homo. Sed kaŭze de treco de naskado kaj reproduktado (kio mem estis rezulto de pliiĝantaj progresadoj de la lando, kaj plialtiĝo de la popola vivnivelo kaj foriĝo de senlaboreco kaj solvo de la loĝejproblemo) ankoraŭ ekzistis kelkmilonoj da analfabetoj en la lando (laŭ la plej nova popol-nombrado, la landa populacio estis pli ol ducent milionoj) kaj ĉar la Unuiĝinta Naciaro lasis la mondan kontraŭ-analfabetecan bataladon al nia lando, la koncernaj respondeculoj rapidis fintrakti tiun ĉi analfabetan grupon, kaj poste okupiĝi pri la aliaj landoj de la mondo. Do, post longaj pripensadoj kaj meditadoj, oni elpensis rimedon kaj difinis tre grandajn premiojn por tiuj, kiuj helpas al rapida nenigo de analfabeteco. Komparate kun tiuj ĉi premioj, sepdek aŭtoj kaj sepcent menoj da oro estis mokindaj kaj infanaĵaj.

Post ses monatoj la nova ideo fruktodonis kaj juna inventisto, kiu finis politekton, inventis kontraŭ-analfabetecan maŝinon. La maŝino produktiĝis en diversaj grandecoj: unupersona, kelkpersona kaj multpersona, la plej malgranda estis kiel telefonkiosko. Ni ne scias pri la teknikaĵoj de la aparato (la juna inventisto tute malkaŝis tion kaj estis registrinta la aparaton kiel sian inventaĵon), sed ĝia funkciigado estis tre facila: oni metis analfabeton en la aparaton, ekfunkciigis ĝin (la aparato funkciis per ducent dudek-volta elektro), post unu minuto, oni eligis la personon jam kapablan legi kaj skribi, el la aparato. Do, anstataŭ unu monato aŭ unu jaro, oni bezonis nur unu minuton por 'kuraci' ĉiun

analfabeton, kaj tia ŝparado en tempo estis eksterordinare grava.

Post kiam la profesiuloj testis la specimenon de la maŝino, kaj ties enorda funkciado konfirmiĝis kaj garantiĝis, oni instalas la ĉefan grandan maŝinon kaj ekfunkciigis ĝin. Flanke de la maŝino ekzistis stirilo, sur kiu vidiĝis numeroj. Simile al la fridujoj, kies temperaturon oni povas kontroli per turnado de butono, ankaŭ tiu ĉi aparato havis diversajn gradojn. Se oni elektis gradon unu, post unu minuto ĝi eligis leg- kaj skrib-kapablan personon. Se oni elektis gradon ses, post ses minutoj elvenis persono, kiu kleriĝis kiel sesjarstuda lerneĵano. La grado naŭ estis por mezlerneĵanoj, dek du por diplomitoj kaj dek ses por licenciuloj. Por pli altaj studniveloj, oni devis duoble kuiri ilin, t.e. post la unua etapo, denove meti ilin en alian kuirejon por du aŭ kvar minutoj. En la unua kazo, elvenis magistroj kaj en la dua kazo



doktoroj.

Post funkciado de la maŝino, la juna inventisto tiel famiĝis en la tuta mondo. Inunde alvenis lin premioj, medaloj, insignoj kaj oficialaj invitiloj. De ĉiuj landoj venis mendoj por aĉeti la maŝinon, kaj ili devis atendi ses monatojn aŭ jaron por ties konstruado kaj ricevo.

De Japanio oni mendis aparaton, kiu anstataŭ elektro funkcias per transistoro kaj baterio. La maŝino tuj prepariĝis kaj dum mallonga tempo, granda grupo da analfabetaj japanoj edukiĝis, kiuj famiĝis je 'japanaj edukitoj' aŭ 'transistoraj edukitoj'.

Unu el la petrolaj kompanioj mendis aparaton por aziaj kaj afrikaj dezertoj, kio funkcias per petrolo, ĉar tie elektro ne ekzistis, aŭ estis tro kara, kaj anstataŭe



petrolo abundis kaj malkaris. La aparato per grado dek ses eligis inĝenieron kaj specialiston pri petrolo. Sed, iun tagon pro neglekto de la kontrolisto de la aparato,

ĝia meĉo tre altiĝis, kaj estigis fumaĵon. Sekve elvenis grupo da fumaĵitoj kaj nigritoj el la aparato. La kompanio ne akceptis ilin kiel inĝenierojn kaj specialistojn, kaj laborigis ilin kiel simplaj laboristoj.

Dume, la ĉefa aparato funkciis bone. Oni kolektis analfabetojn de tie kaj tie, kaj pogrupe alportis ilin per kamionoj kaj malplenigis ilin en la ujon de la aparato, kaj el ties alia flanko elvenis veraj edukitaj homoj tute puraj kaj pakitaj (komplete aŭtomate, senhelpe de manoj). La nombro de analfabetoj estis nuliĝanta, kiam pro neglektado de la elektro-kontrolisto, du malbonaj akcidentoj okazis.

La unua akcidento okazis kaŭze de longaj maldormadoj de la kontrolisto, kiu laboris ekstrajn horojn: li tiel laciĝis kaj dormetis, ke ne atentis pri la kontrolado de la aparato. Pro nesciataj kialoj, la tensio de la elektro eke malaltiĝis, kaj duoniĝis. Ĝis kiam la kontrolisto eldormiĝis kaj solvis la problemon, la aparato eligis kelkmilojn da diplomitoj kaj licenciuloj, kiuj pro la nesufiĉa varmo bedaŭrinde ne bone kuirigis kaj ne krustiĝis; ĉiuj ili estis nebakitaj kaj krudaj. Kvankam ili bone parkeris ĉiujn materialojn de la lemejoj libroj, kaj povis reciti ilin sen plej malgranda eraro, tamen ili ne saĝis eĉ kiom azeno.

La dua akcidento okazis la postan nokton. La elektro-kontrolisto por certigi pri la enorda funkciado de la aparato, altiĝis ĝian tension. Sekve la produktoj de la aparato tro varmiĝis kaj brulis.

Kiam oni malfermis la pordon de la

elira ujo de la aparato - espereble neniam vi renkontu tiajn katastrofojn - sennombraj profesoroj elverŝiĝis el la aparato: ili estis tre maldikaj, havis falditajn haŭtojn, kaj iliaj ostoformoj videblis pro la troa maldikeco. Ili suhavis malnovajn eluzitajn vestaĵojn, kiuj neniel konvenis al ili. Iliaj okulvitroj estis tiel dikaj kiel la fundo de glasoj. Elvenante, ili estis entuziasme diskutantaj pri la sciencoj kaj literaturaĵoj de la ŝtonerao, kaj ties pralingvoj, kaj la etimologio kaj filologio kaj gramatikaj karakterizaĵoj kaj diversaj branĉiĝoj de tiamaj lingvoj. Ili nek laciĝis, nek malsatiĝis, kaj nenio povis ĝeni ilian koncentradon. Eĉ se oni mortigis homon ĉe ilia orelo, ili nek turnis sian kapon, nek interrompis sian diskutadon. La kompatinduloj kvazaŭ ne apartenis al tiu ĉi tergloblo.

Piednotoj:

- (1) La novelon Ferejdun Tonkaboni (1937-) verkis en 1966, kaj la tepmon de la historio menciis 2006, do kun 40-jara distanco. Tial ankaŭ en la traduko saman distancon la tradukinto menciis ekde la nuna tempo.
- (2) Malnova mezurunuo de Persujo; ĉiu meno egalas preskaŭ 3 kg.
- (3) Tre fama verso el La Golestano (La Florejo) de Sadio (1184-1281), kion oni citas ankaŭ kiel proverbon en la persa.

Fonto:

TONKABONI, Ferejdun. Setare-haje ŝabe tire (La steloj de malluma nokto), Tehrano: AmirKabir, 1978. Citita en: Ĉehel dastane kutahe irani az ĉehel nevisandeje moaser (Kvardek iranaj noveloj de kvardek nuntempaj verkistoj), komp. Hasan Zolfagari, Tehrano: Nima, 2004 (2-a eld.), 505 p., p. 338-341.

Desegnaĵo:

Far Tim Brinton el: <http://www.newsart.com/tb/personal/tb1512.jpg>
Bildo de Nombranta infano el: <http://static.nycwp.org/images/ginamoss/addingmachine.jpg>

Tradukis: **Asad Mahbub**

Soci-patologia rigardo al la irana literaturo Morala Menso kaj Admona Kulturo


Dua kaj fina parto

En la antaŭa revunumero vi legis la unuan parton de la artikolo de Ruhangiz Karaĉi, kiu serĉas la radikojn de la nuntempaj sociaj problemoj de Irano en la antikvaj literaturajĵoj de Persujo kaj ties reganta atmosfero. Jen la dua kaj la fina parto, kiu daŭriĝas ĝis nuntempa poetino Parvin Etesami, kies patro, Josof Etesami (1874-1937), fama je Etesam-ol-molk, estis unu el la verkistoj kaj tradukistoj de la tepmo, kiu multe kontribuis al konigado de eksterlando, precipe Eŭropo al irananoj. Li ankaŭ en nia afero okupas specialan lokon historian: li skribis la unuan pri-Esperantan artikolon en Irano. La Red.

Samkiel jam menciigis, la moralo kaj la admonoj depende de variaĵoj kiel tempo kaj loko estas ŝanĝeblaj, tamen rilate al du aferoj ili estas preskaŭ senŝanĝaj. Unue la parolmaniera strukturo de la admonoj rilatiĝas al la maljunaĝo de la admonanta homo, ekz-e la admonoj de Ĥosro Gobadijan skribiĝis kiam li mortontis (Mahmud Ĝafari 1992), Anuŝirvanaj admonoj, fakte estas lia testamento, la admonoj de Saboktak in al Sultano Mahmud verkiĝis post kiam li transdonis la regadon al Mahmud, kaj ankaŭ Golestano kaj Bustano, la moralaj verkoj de Sadio, la mezaĝa mondvojaĝinto, kies motivo de ilia verkado estis plibonigado kaj instruado de la individuo. Due la admonado kaj konsilado estis la speciala rimedo de la politikaj kaj religiaj aŭtoritatoj kaj gvidantoj. Tiel, la kondutaj principoj skribiĝis aŭ diriĝis per la granduloj, potenculoj kaj religiaj sciuloj, por ke ĉiuj popolklasoj prisciĝu kaj utiligu ilin. La origino kaj deveno de la hierarkia sintenado, kio ekzistas en tuta irana kulturo, tiel montris sin en la admona kaj morala literaturo, “La popolo ĉiam devas havi pligrandulon, ĉar la hegemonio de la pli

granda super la malpli granda ekzistas en la naturo de la homo” (1). Estas notinde ke virinoj neniam sin trovis pligrandaj, por ke admonu la aliajn; kvankam praktike virinoj de longe faris tion, tamen nenia admonlibro ekzistas far virino. La verkinto de Aĥlage Ĝalali (Ĝalalia Moralo) evitigis la junajn virinojn de la maljunulinoj akuzitaj je kontraŭmoralaj agoj kaj ankaŭ rekomendis al ili ne interkonsiliĝi kun ili, ĉar ilia malalta saĝo kondukus al malmoralo (Ĝalal-ed-din Davani 1922, p. 201).

Verŝajne la ekzisto de la instrua literaturo kaj tiom multe da moralaj kaj admonaj libroj en la persa literaturo, estas unu el la atestaĵoj montrantaj, ke la irana socio en la pasinteco estis efikita per la malmoralaj bazoj, kaj pluraj kontraŭvaloroj furoris: ŝtelado, hipokriteco, rabado, prostituado, pederastio kaj ignorado. Por kontraŭi tiajn maldeziratajn elementojn, la poetoj kaj verkistoj kulture sentis la neceson por atenti al tiaj problemoj, kaj per esprimado de admonoj ekmilitis kontraŭ ili. Sendube libroj kiel Hijal-ol-nesa (Virinaj ruzoj) kaj Hijal-ol-losus (Ŝtelistaj ruzoj) kaj admonverkoj kaj moralaj libroj estas produktaĵoj de socio plenplena da



malmoralaj elementoj, kiuj verkiĝis kun la celo moralecigi la socion kaj eduki moraleman homon. La riĉa fluado de la admonema literaturo, kio komenciĝis de unuaj skribitaj verkoj, atingas al la grandioza morala verko de la nuntempa poetino, Parvin Etesami, kio kvankam ne verkiĝis tiutempe, tamen povas esti bona finanto por tia verkado. Antaŭ 66 jaroj publikiĝis poemkolekto, kio ankoraŭ estas sur la plej alta loko, kaj kio malkiel aliaj admonlibroj, kiujn verkis maljunaj viroj, verkiĝis per juna virino, Parvin Etesami, kiu nek havis aŭtoritaton politike, nek havis potencon religie, kaj kiu aliflanke kredis ankaŭ al fatalismo, kaj ni scias, ke la fatalismo kaj moralo kontraŭas unu la alian. Estas dirinde, ke tiuj ĉi du kontraŭaj kredoj ekzistas tra la tuta poemlibro de ŝi. Sed antaŭ atenti al la internaj emoj de la poetino al admonado kaj moralo, ni anentu al la eksteraj faktoroj, kaj al la socio, kiu estis ŝanĝiĝanta, por vidi kiel ili, ĉirkaŭante la poetinon, efektis sur ŝi.



plimultiĝantaj. La alta frekvenco de la moralaj temoj en ŝiaj poemoj montras ŝian kredon al la plibonigado de la individuo en la malsana socio. En ĉiu el la 209 poemoj de ŝi, oni povas trovi moralajn temojn; iam unu verso aŭ kelkaj versoj, kaj iam la tuta poemo estas pri morala temo, admonante kaj invitante al boneco (2). Eĉ la frekvenco de la moralaj vortoj montras ŝian sindediĉon al la plibonigado de moralo: en ŝiaj 42 odoj la vorto vero 10foje, justeco 17foje, boneco 15foje, sci(enc)o 39foje, prudento kaj pensado 8foje ripetiĝis. Kvankam tempo, okazo kaj oportuno ne estas moralaj vortoj, tamen por ŝi bona utiligado de la tempo kaj okazo tiel multe gravis, ke 25foje ripetis ilin. Aliflanke, en tuta ŝia poemaro oni ne povas trovi vorton aŭ temon kontraŭa al nia malnova moralo kaj tradicio, aŭ ion, kio povus interpretiĝi kiel malmoralajo aŭ malvaloro.

La poemoj de Parvin ne estis nur simplaj moralaj admonoj, ŝi en tiu malsana socio kaj kun tiom multe da pikantaj sociaj realoj, sentis respondecon por si, kaj ĉar ŝi

Estas tute nature, ke dum la socipolitikaj ŝanĝiĝoj, kaj sekve de penetrado de la fremdaj kulturoj - kaj la renkontiĝo de la tradicio kun la moderneco - kriterioj de la malnovaj moralaj valoroj iom post iom ŝanĝiĝu. Inter la idealoj kaj la realoj de la socio ekestiĝas kontraŭeco, kaj, nenormalaĵoj kaj malvaloroj anstataŭiĝas la antaŭajn normalaĵojn kaj valorojn, kaj ĝenerale la kriterio por valoroj ŝanĝiĝas, kaj ĉar la valoroj estas dependaj de la politikaj, sociaj kaj kulturaj faktoroj de la socio, kaj efikas sur la homoj, sekve, ankaŭ la moralaj sintenoj de la homoj en la socio iom post iom aliiĝas.

La pozitivaj kaj negativaj reagoj de artistoj, devenantaj de iliaj eksterordinaraj sentivecoj, estas unu el la faktoroj kondukantaj al la moralema literaturo. Parvin Etesami dum la tempo de la aliiĝado de la moralaj valoroj, volis ekvilibrigi kaj konvenigi socion, kiu jam estis deformiĝinta kaj kontraŭmoralaj elementoj en ĝi estis

ne povis krei anstataŭ la silentaj subpremataj homoj, kaj trovis la vojojn por batalado kaj sciigado baritaj, enpoemigis admonojn devenintaj de siaj spertoj. Tamen, atentado al la moralaj problemoj, neniam forigis ŝin al rigardado al la politikaj problemoj. Ŝia angoro pri la deformiĝintaj moralaj valoroj, instigis ŝin al ilustrado de pura medio kaj ideala homo, kiuj ĝuis justecon, honestecon, verdiremon, purecon, bonecon kaj grandanimecon, kaj ŝi imagigis la homojn en Utopio, kiun ŝi kreis plej bone kaj dezirinde pere de arto kaj scienco, kiuj estas la nuraj du faktoroj formantaj la homan moralon.

La enhavo de ŝiaj poemoj konsistis el valoroj, al kiuj ŝi kredis, kiuj baziĝis sur ŝiaj moralaj kaj homecaj devontigoj, kaj kiuj devenis de ŝia humanista sintenado. Parvin pli estis logika kaj raciista homo ol sentema poeto; ŝi simpatiis kun aliaj homoj, kaj ilies problemojn ne konsideris aparte de siaj problemoj; alies suferado kvazaŭ estis ŝia

suferado, kaj ŝi plenpove strebis por malaltigi la suferadon de la homoj kaj instituciigi la justecon kaj verdiremon. Kvankam ŝi sciis, ke la arto ne havas nur edukadan rolon, tamen kredis, ke ĝi povas esti instruanta kaj helpi al estigado kaj konservado de la korekta moralo. Ŝia morala kaj homeca tasko, kiel poeto por la socio, estis racia konfirmado de moralaj kutimoj kaj juĝoj, kiam ŝi disponis nenian rimedon krom la poemo, per kiu ŝi kapablis disvastigi bonkondukon kaj indan moralon kaj kion ajn alian laŭ ŝi korektan. Sendube en tiuj sociaj kondiĉoj, la poemo estis la plej konvena ilo en la manoj de virino, kiu neniel rajtis sinesprimi en la virrega (patriarkeca) socio.

Kiel ajn, Parvin klopodis por fortikigado de morala socio, sed kial ŝi tion volis fari kaj kial tian sintenon ŝi prezentis en siaj poemoj? Certe tio dependis de ŝia intovertemo kaj morala edukado kaj sintenado, kio devontigis ŝin rilate al la moralaj principoj de la socio, kaj kio estigis en ŝi specialan senton por respondeco kaj eksterordinaran sentemon por strebi kiom eble plej multe cele al plibonigado de la socio kaj estigado de moralema medio. La homo pro sia sociemo, ĝuas simpatian kaj kompaton al aliaj, kaj ankaŭ pro iliaj suferoj kaj doloroj reagemas. Sed la sentemaj kaj emociaj reagoj de la poetino kontraŭ la suferoj, doloroj kaj deprimiĝoj de la homoj, melankoliigis la etoson de ŝiaj poemoj kaj ĉar la poemo estas reflektajo de la reala mondo, tio transformis ŝian poemon en admonojn kaj konsilojn, kaj tiel konigis ŝin kiel la plej moraleman poeton de nuntempo.

La simpatio de Parvin pri la suferoj de aliaj homoj, devenis de ŝiaj introvertaj sentoj, kiuj forte dependis de ŝiaj menso kaj personeco, kaj sendube unu el la plej gravaj faktoroj, kiuj pliigis la moralemon de Parvin estis ŝia introverta personeco. Laŭ skribaĵo: "Ŝi pro subigado de ĝio (id), kio estas la fonto de deziroj, far subigantaj ego kaj superego, kaj psika kaŝado, havis personecon, kiu agis laŭ la volo de la patro, kaj tial ŝi lian metodon alprenis por si; kaj malgraŭ nespertado de patrineco, la imagado pri esti patrino kaj havi tian sperton tiel ekregis ŝin, ke ĉiuj ŝiaj poemoj plenpleniĝis de patrina sento, kio en psikologio de C. G. Jung, famas je 'granda patrino'" (Alireza Mozaffari 1993).

Ho koro, vane ne angoru pri la mond'

*Ne pripensadu ne venintan morgaŭon
Se vi ĝuste pensas, la angulo de la kaĝo,
Estas kiel florejo por pacienca bird'
Fendu la teron kaj tiam rigardu
La tempon fifaman senafabla*

Ankaŭ tiu ĉi faktoro estas grava en distingado inter la poemoj de Parvin kaj tiuj de la samtempaj poetoj kaj eĉ poetinoj. La poemo de Parvin pro ĝia raciema enhavo, kaj virineca lingvo, kaj la specialaj temoj, trovis sian identecon kaj propras al ŝi. Krome, neniuj aliaj poetoj en la historio de la persa poezio tiom multe pensokupiĝis pri la moralo kaj admonado.

Piednotoj:

- (1) Citita el Ŝahnameje AbuMansuri (Ŝahnameo laŭ AbuMansur), verkita en la 346-a lunheĝira jaro, (Charles Henry de Fuche Core 1998, p.131).
- (2) Surbaze de la suba eldono de ŝia poemaro: ETESAMI, Parvin. Divane gasajed va masnavijjat va tamsilat va magtaat (Poemaro inkluzive odojn, masnaviojn, alegoriojn kaj fragmentojn), Tehrano: Abol-fath Etesami, 1962 (la 5-a eld.).

Referencoj:

- ABOL-GASEMI, Mohsen. Jasne pangaho sevvom (53-a Jasno), Farhang, vol. 14, n-ro 1 kaj 2, printempo kaj somero de 2001, p.1
- AHUNDZADE, Fath-ali. Alefbaje ĝadid va maktubat (Nova alfabeto kaj skribaĵoj), Hamid Mohammadzade (red.), Tabrizo: Naŝre ehja, 1978.
- DAVANI, Ĝalal-ed-din (Mohammad ebne Asad). Aĥlage Ĝalali (Ĝalalia moralo), Lekahnu: Nulkeŝvar, 1923.
- FUCHE CORE, Charles de Henry. Aĥlagijjat (Moralajoj, Moralia), trad. persan M. A. Amir-Moezzi kaj A. Ruh-baĥŝan, Tehrano, Markaze naŝre daneŝgahi, 1998.
- ĜAFARI, Mahmud. Adabijjate andarzi dar motune farsije mijane (Admona literaturo en la teksto de la mez-persa), Ĉista, vol. 9, n-ro 8, 1992, p.868.
- MOHTARI, Mohammad. Tamrine modara (Praktikado de tolerado), Tehrano: Viŝtar, 1998 (2-a eld.).
- MOHTARI, Mohammad. Ĉaŝme morakkab (Kunmetita okulo/Okulo de inko) Noŭ-andiŝi az negahe ŝe're moaser (Novpensado laŭ la nuntempa poezio), Tehrano: Tus, 1999.
- MOZAFFARI, Ali Reza. Nagde ŝaĥsijjate Parvin (Kritiko de personeco de Parvin), aperinta en la revuo de la fakultato pri literaturo kaj homaj sciencoj en la Ferdouŝia universitato de Maŝhado, jaro 26, n-ro 1, 1993.
- TALEBOF, Abd-ol-rahim ebne Abutaleb Naĝĝar Tabrizi. Masalek-ol-mohsenin (Principoj de bonuloj), kun enkonduko de Bager Momeni, Tehrano: Ŝabgir, 1977.

Fonto:

- KARAĈI, Ruhangiz. Zehnijjate Aĥlagi va Farhange Andarzi (Moralaj Menso kaj Admona Kulturo), Zanan (Virinoj), 13a vol. Bahman 1383 (Jan. 2005), 112 p., p.62-5.

Foto:

<http://www.enel.ucalgary.ca/People/far/hobbies/iran/parvin/left.html>

Floroj el "La Florejo" de Sadio

Por tiu ĉi numero refoje utilaj maksimumoj estas elektitaj el la riĉa mino de la lasta ĉapitro de Golestan (la Florejo) far Sadio. Legu kaj apliku ilin por pli plaĉa vivado!

La oro akireblas el la mino per ago. زر از معدن به کان کندن برآید و زدست بخیل به جان کندن.
minista kaj el la avarulo per ago insista.

La tero ricevas de l' ĉiel' favoron kaj la ĉielo ricevas de l' ter' pulvoron. El ĉio sekreciigas tio, kio estas en ĝi.

زمین را ز آسمان نثار است و آسمان را از زمین غبار، کل انا
یترشح بمافیہ.

۴۳

14

*Se laŭ vi mia kondut' estas fia,
Vi daŭre agu laŭ la bona via.*

گرت خوی من آمد ناسزاوار
تو خوی خویش از دست مگذار

Kiu kun si pacigas malamikojn, tiu celas ĉagreni amikojn.

هر که با دشمنان صلح می کند سر آزار دوستان دارد.

*Ho la saĝa! Evitu tiujn amikojn
kiuj rendevuas viajn malamikojn*

بشوی خردمند از آن دوست دست
که با دشمنانت بود هم نشست

Du personoj mortis kaj sopiron forportis : unu kiu havis kaj ne utiligis kaj la alia kiu sciis kaj ne aplikis.

دو کس مردند و حسرت بردند: یکی آنکه داشت و نخورد و
دیگر آنکه دانست و نکرد.

*Ja se iu vidas avaran noblulon
tiu klopodas veki pri li suspektojn.
Sed se malavarul' faras ducent pekojn,
Lia malavar' kaŝas liajn difektojn.*

کس نبیند بخیل فاضل را
که نه در عیب گفتنش کوشد
ور کریمی دوصد گنه دارد
کرمش عیب ها فرو پوشد

La regno pro kleruloj belaspektiĝas kaj la religio pro piuloj perfektigias. La reĝoj bezonas maksimumon de l' kleruloj pli ol tiom, kiom la kleruloj bezonas intimon de l' reĝoj.

ملک از خردمندان جمال گیرد و دین از پرهیزگاران کمال
یابد. پادشاهان به صحبت خردمندان از آن محتاج ترند که
خردمندان به قربت پادشاهان.

Troa kolero kaŭzas timon kaj malĝustatempa favoro detruas estimon; nek tiom koleru ke oni malŝatu vin, nek tiom toleru ke oni ekmastru vin.

Kiu kverelas kontraŭ personoj de alta rango, tiu sekvigas verŝiĝon de sia sango.

*Ĉu vi pensas ke vi altrangas?
Ja la strabul' vidas unun du,
Baldaŭ vundiĝos via frunto,
Kontraŭ virŝafo se vi ludu!*

Malmulto sur malmulto fariĝas abundo kaj guto sur guto fariĝas inundo; tio signifas ke malfortuloj tenu ŝtonetojn por ĝustatempe venĝi uzurpulojn.

*Guto sur guto fariĝas rivero,
Kaj river' sur river' fariĝas maro.*

*Malmulto sur malmulto fariĝas multo,
Gren' sur greno, grenejo estas rezulto.*

خشم بیش از حد گرفتن وحشت آرد و لطف بی وقت هیبت برد، نه چندان درشتی کن که از تو سیر گردند و نه چندان نرمی که بر تو دلیر شوند.

هر که با بزرگان ستیزد خون خود ریزد.

خویشتن را بزرگ پنداری
راست گفتند یک دو بیند لوچ
زود بینی شکسته پیشانی
تو که بازی کنی به سر با قوچ

اندک اندک خیلی شود و قطره قطره سیلی گردد، یعنی آنان که دست قوت ندارند سنگ خورده نگه دارند تا به وقت فرصت دمار از دماغ ظالم برآرند.

و قطر علی قطر اذا اتفقت نهر
ونهر علی نهر اذا اجتمعت بحر
اندک اندک به هم شود بسیار
دانه دانه است غله در انبار

Aforismoj de M.M

,PvC pwi× Ājμ ÚPİF ϕiF
.PwiŪ pwi× ŪlijiF ŪPİF Ājμ D×C
Ve povas doni sen ami,
sed ne povas ami sen doni.

.IŪOwç ĀDZEβiμ ,lzDF p°Ó Ājμ iOĀP
kiam amo magras, kulpoj estas dikaj.

.kβjĒ ÚCBOi×ŪPok qC @Ā¾ Coi×kAHĪĀ
La homan koron eblas
malfermi nur elinterne.

,PvC pꞤw¾ oβŪ ÚBaØç iOvPk oPŪ
.lzDF ÈeoDN ÚA ½Cp-C éÆ kβz í× ælëk
í×DÈŪç -Ā¾
la lumo de amikeco estas kiel tiu
de Fosforo, vidata kiam ĉirkaŭe mallumas.

lëph ÚCβN í× iOvPk DF -Ā¾ Co iOvPk
Amikecon nur per amikeco devas aĉeti.

,lFDë Pvk Ājμ 'BŪ ÝëpNÔμC éF kp¾ Èë pĒC
Dç ŪBiĪi× MpꞤŪ ÚkpÆ iSŪh êCpF Ājμ ÚA
.kβF lçCBh í¾DÆ pꞤŪ

Se unusola homo atin gas
la plej altan specon de amo,
ĝi estos sufiĉa por neutraligi
la malamon de milionoj.

ÚkoÆ kPFCŪ êCpF Ý~Ø®× P p®h íF æCo
DèŪN

.êqDv kβh PvPk Co êP éÆ PvC ÚA ÝØzk
la sole imuna kaj certa maniero neniiĝi
vian malamikon estas amikiĝi kun li.

Tradukita nuntempa novelo

La Birdo

Verkis: (s-ino) Azar Rašidi
Elpersigis: Asad Mahbub

”Azade! Tiu ĉi kompatinda kaj mizera pasero rompis sian bekon. Ho, kiom senkompataj estas vi. Kial vi ne liberigas ĝin?”

”Onjo, onjo, ĝi ade ekflugas al la vitro, frapiĝas kontraŭ ĝi, kaj falas teren. Ekde la meteno ĝis nun pli ol dek fojojn ĝi flugis al la fenestro kaj kontraŭfrapis sin al la vitro. Tial ĝia beko eksangis.”

”Oh, vi mem scias tion, kaj ankoraŭ ne liberigas ĝin?!”

Pari iras al la fenestro kaj ...

”Onjo Pari, kion vi volas fari?”

”Mi volas liberigi la mizeran besteton.”

”Ne, onjo, se vi liberigas ĝin, Sijavoŝ tiel koleriĝos.”


”Tio ne gravos.”

”Pari, nun ne liberigu ĝin, lasu nin kuraci ĝian bekon, poste ni forflugigos ĝin.

Pari ekiras al sia fratino.

”La malbeno de la malfeliĉa birdo trafos vin. Azade kial vi?! Mi ne atendis, ke vi lasu la infanojn mal-liberigi la mizeran birdon en la ĉambro.”

”Mia oponado ne povis efiki ilin. Nome mi ne povis konvinki ilian patron. La ĉefa kulpanto estas ilia patro. Ĉu vi ne memoras kiom longe li fordonadis sian monon por aĉeti najtingalojn, kanariojn



k.s. por teni ilin en la kaĝo?! Vi ne povas diveni kiom multe ni kverelis pri tio. Li tiel obstinas. Mi neniel povas konvinki ilin; li ne komprenas kion mi diras.”

”Se mi estus anstataŭ vi, mi elflugigus tiujn birdojn tra la fenestro kiam li forestis; kion li povus fari?!”

”Nu, la morgaŭon de tio li irus kaj anstataŭ ĉiu birdo, aĉetus du birdojn! Fakte li faris tion kelkfoje - plurfoje. Ĉu li ne kolektis mutajn kolombojn sur la tegmenton?! Kelkajn fojojn mi disrompis la kaĝojn, sed tio nenion solvis.”

Pari, sekvante sian fratino, iris en la kuirejon kaj staris tie.

”Ĉu li ankoraŭ havas la kolombojn?”

”Ja, lia moŝto ĉiutage pasigas kelkajn horojn sur la tegmento. Li okulumas ĝenante la najbarojn...”

”Kiel vi deziras la teon? Ĉu en glaseto,

aŭ glaso?" Pari respondis ke tio ne diferencas por ŝi.

"Vi ne scias kio okazis hieraŭ. Li iris kuŝi sur la balkonon. Estas kelke da tempo, ke iu malfeliĉa birdo faris neston sur la ombrigilo super la fenestro kaj demetis ovojn. Nun estas du tri semajnoj, ke ĝiaj idoj eloviĝis."

Azade metis la te-pleton sur la plankon antaŭ la fratino kaj petis ŝin eksidiĝi. Pari metis la birdon sur sian manplaton kaj delikate karesis ĝin. Oni sonoris ĉe la pordo. Pari iomete moviĝis.

"Estas neniŭ (fremda); Siavoŝ, kiu iris aĉeti fruktojn, revenis; estu komfortaj."

"Saluton onjo. Onjo ĉu vi vidis mian paseron. Rigardu kiom belas ĝi."

"Jes ĝi tre belas, sed la birdeto ĝenatas. Kiel vi havigis ĝin al vi?"

"Onjo, hieraŭ mia patro kaj mi sidis sur la balkono, kiam ni ekvidis ĝin, kiu falis sur la teron elde sia nesto. Ĝi falis antaŭ nin. Mia patro tuj eksaltis kaj kaptis ĝin. Ĝi ankoraŭ estas eta paserido kaj ne povas bone flugi. Onjo, donu ĝin al mi."

Pari duon-malfermis sian manon kaj diris: "Vidu kara, ĝia beko sangis, vi devas liberigi ĝin, ĝi vere kompatindas."

"Ne, onjo, mi faris skatolon por ĝi, kaj metas ĝin en la skatolon, vidu!"

Li ekkuris en la dormoĉambron kaj revenis kun distruigita skatolo.

"Vidu, jen ĝia domo. Mi truigis la skatolon por ke la areo bone atingu ĝin."

"Kara Sijavoŝ, la mizera besteto tiel timas. Vidu kiom rapide batas ĝia koro."

"Pari, trinku vian teon!"

"Mi trinkos tion. Ne hastemas mi. Mi ŝatas teon malvarma."

Ŝi metis la pasereton en la skatolon kaj diris al Sijavoŝ: "Metu ĝin en iun angulon, kaj kiam ĝia beko resaniĝis, lasu ĝin foriri. Permesu ĝin iri al sia patrino."

"Onjo, hieraŭ ĝia patrino flugadis super niaj kapoj kaj pepegis. Mi patro diris al mi porti la paseridon en la domon, por ke ĝia patrino ne vidu ĝin. Sed ĝis la vespero la patrino pepadis kaj ne foriĝis de antaŭ la fenestro."

"Nu, kion diris via patro? Ĉu li ne diris al vi ellasi ĝin ĉar ĝi ĝenatas. Ĝia patrino estis insultanta kaj malbenanta vin."

"Ne, li mem kaptis ĝin por mi."

La patrino enmanigis la skatolon al Sijavoŝ kaj diris al li meti ĝin en angulon. Poste ŝi rigardis al Pari kaj diris: "Mi – kiu mem estas patrino – komprenas tiun malfeliĉan patrinon. Kredu min, ĝi volis beki la kapon de Sijavoŝ, kiam li tenis ĝian idon enmane. Ĝi faris kion ajn ĝi povis. Ĝi volis enveni en la domon kaj sekvi la idon."

Sijavoŝ portis la skatolon en la dormoĉambron kaj revenis. Li iris en la kuirejon kaj kunportis bovlon da akvo en sian ĉambron.

"Ĉion kaŭzis lia patraĉo. Sijavoŝ estas infano kaj ne komprenas ion. Hieraŭ mi kverelis lian patron. Mi diris al li: 'Vi ne estas infano, lasu ĝin foriri. La malfeliĉa birdo kompatindas, vi ne estu tiom senkompata.' Fine mi diris lin: 'Kio ajn, vi estas buĉisto', li ekridegis kaj diris: 'Ja vi estas la reĝino de kompatoj kaj afablo, ĉu ne?!'"

Pari rigardis sian horloĝon kaj diris: "Ĉiuj viroj estaj tiaj. Kion ajn ili diras, tio devas plenumiĝi. Tio ne dependas de tio ke ili estas buĉistoj aŭ ne."

"Ne, li estas alio. Li buĉis tiom multe da bovoj kaj ŝafoj, ke li plu ne havas



kompaton. Ankaŭ Sijavoŝ esploradis, kaj diris, ke li ne deziras ellasi la birdon. Nome, li sekvas sian patron. Fine mi diris al Sijavoŝ ke morgaŭ li devas liberigi ĝin, sed lia patro diris min lasi lin teni ĝin.”

Subite ekaŭdiĝis bruado de infanoj el la ĉambro. Azade interrompis sian parolon kaj demandis ilin: “Kio okazis al vi aĉaj? Kial vi tiel bruadas?”

“Panjo, Sijavoŝ deŝiris mian kajeron. Li disŝiris ĉiujn miajn hejmtaskojn.”

“Ne, panjo, ŝi mem ekpuŝis min kaj mi falis sur ŝian kajeron. Ĝi mem disŝiriĝis, sed ŝi diras ke mi ŝiris ĝin.”

Azade kap-aludis al Pari kaj la teo, kaj diris ŝin: “Via teo jam malvarmas.”

La patrino ekiris al la ĉambra pordo. La krioj de la infanoj jam pliiĝis.

”Panjo, vidu kion li faris kontraŭ mia kajero.”

La filino montris la disŝiritajn foliojn al sia patrino. Sijavoŝ ekbatis la stomakon de la fratino per sia pugno, kaj diris:

“Vi, mensogulo! Mi ne ŝiris tion, ĝi mem ŝiriĝis.” Li ekkuris al kraĵono, kiu kuŝis sur la tero kaj tenante ĝiajn ekstremojn en la manoj, duonigis ĝin per la frapo de sia genuo. La patrino ekkaptis lian manon kaj diris: “Vi tre malboniĝis. Kial vi faris tiel. Kial vi rompis la kraĵonon? Nun kiel ŝi skribu siajn taskojn? Verŝajne vi bezonas puniĝi por pliboniĝi. Nun vi iru en la banĉambro-

por kelkaj minutoj, por ke vi plu ne ripetu tiajn fiaĵojn.”

Ŝi trenis lian manon kaj puŝis lin en la banĉambro, kaj fermis ĝian pordon.

”Ekde hieraŭ ĝis nun vi ade ĝenis kaj kolerigis min. Vi, ne kompreniva infanaĉo!”

La banĉambro estis malgranda kaj malluma. Sijavoŝ forviŝis siajn larmojn per sia mandorso. Kiom ajn li rigardis al la muro por trovi la ŝaltilon de la lampo, li ne povis vidi ĝin. Li kaŭre sidiĝis en angulon de la banĉambro por ke liaj okuloj kutimiĝu al mallumo kaj povi vidi ion. Lia spirado malfaciliĝis. Kio okazus, se la blatoj de la banĉambro venus al li! Li ĉiam timis de mallumo. Li eksentis plimfacilan spiradon. Li sentis ke la muroj proksimiĝas al li kaj premas lin.

”Panjo, panjo pardonu min. Mi eraris, malfermu la pordon!”

Li pugnofrapis kontraŭ la pordo.

”Panjo, mi plu ne disŝiros ŝian kajeron, Mi promesas tion. Malfermu la pordon.”

La patrino malfermis la pordon kaj diris: “Nu, iru al via fratino kaj pardonpetu de ŝi; neniam plu ripetu tiajn agojn.”

Sijavoŝ iris al sia fratino kaj preterpasis ŝin. Li eligis la birdon el la skatolo kaj malfermis la fenestron. La birdo malaperis en la bluan ĉielon.

Fonto:

RAŜIDI, Azar. Nane-tanha (Sol-panjo), Tehrano: Naŝre Eŝare, 2004, 107 p., p. 33-38.

Bildoj:

<http://www.norsecode.com/mlstudio/images/yukon/sparrow.jpg>

<http://www.ha.sad22.us/BenJohnson/sparrow-small.gif>

Islamo kaj *Irananoj*

Antaŭparolo

Pasis pli ol 14 jarcentoj ekde la kunpuŝiĝo de irananoj kaj muzulmanoj kaj de islama eniro en Iranon, sed malgraŭ tio, ankoraŭ ni alfrontas al interpretoj kaj juĝoj ne juste mezuritaj kaj malĝustaj. La publiko elprenas tion laŭ kredaj vidpunktoj, sed inter la edukitoj kiuj bezonas je pruvoj firmaj kaj logikaj, kelkfoje oni vidas ankaŭ juĝojn malĝustajn. Kompreneble al tiuj, kiuj paŝadas en kultur-historia sfero, la problemo estas solvita, sed tiuj, kiuj malpli konas debatojn ĉi-rilate, aŭ ilia stud-kampo aŭ laboro estas ekster la sfero, ili en siaj interpretoj implikiĝas en troigoj aŭ maltroigoj kaj ne havas sincerajn juĝojn.

La motivo havigi ĉi tiun skribaĵon jam formiĝis alfronte al menciitaj individuoj kaj estas kolopodo-kvankam koncize-elmeti la kialojn por la facila disfalo de monda regnado de Sasanida dinastio antaŭ la atako de arabaj muzulmanoj kaj islamaniĝo de irananoj.

La politika, ekonomia kaj socia situacioj de Irano en la lasta-tempo de sasanidoj

La serioza kaj ĉiu flanka ekmoŭvo de Arabaj muzulmanoj al Irano komenciĝis en la erao de kalifo Omar

kaj mallongtempe post kelkaj gravaj militoj irananoj estis venkitaj kaj iom post iom la tuta Irano falis en la manojn de muzulmanoj kaj Jazdgerdo la 3a, la lasta ŝaho Sasanida nur gajnis malvenkojn kaj forkurojn senutilajn. Ĉi tie ni priskribas nur la kondiĉojn kaj analizante tiujn ni venos al konkludo. La politika pozicio de Irano en la fruaj tempoj de kalifo Omar estis intensigita kaj implikita. Post la morto de Ĥosro-parviz la lasta granda Sasanida ŝaho (628-632p.k), kiam Jazdgerdo la 3a sidis sur tronon, dum kvar jaroj Laŭ orde 12 personoj surtroniĝis, kiuj aŭ preterlasiĝis aŭ estis mortigitaj. Tiu fenomeno indikis al la ne-stabileco de la politiko kaj manko de inda individuo por la regado. Samtempe pro la malfortiĝo de ŝtat-potenco centra, la komandantoj, nobelaro kaj zoroastraj sprituloj konkeris kelkajn regionojn kaj ekregadis, kio pliigis la disiĝon kaj la sporadon. Kelkaj agadoj de Ĥosro-parviz plantis la semojn de malforteco kaj estonta dekadenco, ekz. li pro kialoj iluziaj faligis la araban ŝtaton en "Hireo", kio situis kiel baraĵo inter Irano kaj atakemaj araboj kaj bone konis la araban milit-manieron kaj ties helpo povus esti efika por li.

Ĥosro-parviz kvankam en militoj kontraŭ orienta Romo(Bizanco) mirige

atingis al grandiozaj venkoj, sed li povus utiligante la malfortecon de Bizanco fari profitan pac-kontrakton favore al Irano, tamen li daŭrigis la militadon kaj foruzis la forton de siaj armeanoj kaj perdis multajn regionojn. Resume la Sasanida ŝtato, interne estis dronita en plenan perverson, korupton kaj dekadencan.

Ekonomie la finacaj reformoj de Anuŝirvano, provizore plibonigis la popol-staton kaj kompreneble en longa tempo la altaj tavoloj profitis. Aliflanke, sennombraj militoj kaj maltrankviliga situacio kaŭzis detruon en komercado, industrio kaj agrikulturo. Inundego de riveroj Dajle (Tigriso) kaj forato (Eufrato) de Irano, kiuj ruinigis ties okcidentajn kampojn kaj la epidemio de plago en la regionoj, pli gravigis la mizeron de la popoloj. La riĉaĵoj kaj postenoj estis centralizitaj ĉe specialajn homojn kaj la plejmulto estis senigitaj de siaj ordinaraj rajtoj kaj perdante siajn financ-rimedojn pagis pli kaj pli da impostoj, sed la reĝaj ĉirkaŭuloj kaj elitaj tavoloj tute ne pagis imposton. Tiaj kondiĉoj jam faris la popolojn malkontentaj kaj malpaciencaj.

Laŭ socie la popoloj estis dividitaj en kvar klasojn aŭ soci-tavolojn: relegiuloj, militistoj, sekretarioj kaj normalaj homoj. La dividiĝo estis tro kruda kaj estis kalkulata kiel kasta. Krom esceptaj kaŭzoj, la ordinaraj homoj ne kapablis altrangiĝi kaj ili devus ĝis la fino de la vivo fikse resti en siaj klasoj aŭ tavoloj. Tiu afero en la komenco kaŭzis stabilecon en la socio, sed iom post iom malkunlaborado kaj malakordo inter la tavoloj kaŭzis grandan spacon inter ordinaraj popoloj kaj altaj tavoloj, ĉar ili eltenis la premojn de imposto kaj finaco kaj garantiis la infanterion de armeo estante sengita de ĉiaj rajtoj kaj avantaĝoj.

La situacio de la kulturo, pensado kaj kredo en Irano

En la lasta erao de Sasanida dinastio, la edukado preskaŭ estis monopoligita nur ĉe la reĝa familio kaj elitaj tavoloj kaj la publiko estis senigita de tiu rajto kvankam en la mezo kaj sub-tavoloj ekzistas pli da talentoj, kiuj bezonas edukadon kaj subtenon.

Se ni juste rigadas, ni vidos, ke ekde la Sasanida erao ni ne estis liverinta ion rimarkindan en kampon de scienco kaj havis tre malmultajn sciencistojn, kiuj ne kompareblas kun la amaso da sciencistoj en la islama periodo en Persujo.

La subtenado de kristanismo per Bizanca-ŝtato, havi eklezian bazon en la lando, ekzisto de judaj centroj inter la limoj de Irano, la alesto de Buddistoj en la oriento, ankaŭ la alesto kaj daŭrado de Maniaj (Maniĥeaj) kaj Mazdakaj pensoj, iomete da greka filozofio precipe post la fondiĝo de Ĝondiŝapur-universitato en Ĥozestano kun grekaj profesoroj, cirkuligis fluojn en la socio kiel rivalojn kontraŭ la pens-maniero de ŝtato, kiu impresis la menson de la popoloj, kiuj almenaŭ per siaj penso kaj kontemplado ekis kontraŭi la oficialan relegion kaj regantan penson.

Bedaŭrinde la Zaraduŝtra religio kaptite en la manoj de Zoroastraj spirituloj oportunistaj, fariĝis jam faktoro por la premado kaj popol-silentigado. Tiu ĉi oficiala relegio subtenis kaj konfirmis la soci-tavolan kaston, ankaŭ flanke de Sasanida ŝtato estis misuzita. La Zoroastraj spirituloj pleje atentis al la eksteraĵo kaj ceremonioj kaj pritraktis nur rekoni la kredantojn el la miskredantoj, nomi la kontraŭulojn sendiaj, kaj pereigi ilin kaj tenadi la homojn en sia flanko. la regadon akompanis diversaj torturoj kaj turmentoj.

La Armea situacio de Sasanidoj

La armeo de Sasanidoj estis potenca, armita kaj ordema, kiun konsistigis kavaliere kaj infanterio. La kavaliere estis organizita el nobelaro kaj aristokratoj, kiuj ne pagis imposton kaj la infanterio el ordinara popolo kaj vilaĝanoj. Ĉi tiu ordema kaj potenca armeo reorganizigis en la tempo de Anuŝirvano* kaj fariĝis pli armita kaj sukcesigis iranon en diversaj militoj. La grandegaj militoj de Ĥosro-parviz, kiu kelktempe disvastigis la teritorion de la Send-rivero ĝis la Egiptujo, per tiu armeo realiĝis. Post la unuaj venkoj de Ĥosro-parviz, la daŭrado de militoj kaj atakoj, kiuj plu jam fariĝis ferenezecaj, kaŭzis la eluziĝon de la armeo kaj havis malbonan efikon sur la spiritojn de la armeanoj. Ili estis jam mallogitaj kaj malkontentaj. La militoj kvankam gajnitaj alportis al ili malvenkon fine, ĉar la infanterio, kiu konsistis el vilaĝanoj kaj ordinara popoloj kaj estis la korpo de la armeo, krom la militservoj ili pagis la imposton kaj estis ankaŭ implikitaj en la soci-tavolaj premadoj, estante for de sia vivo kaj laboro, ricevis nenian porcion kaj salajron, do, kiel ili povus subteni la ŝtaton, kiu melkis ilin kaj profitis de iliaj servoj sen estigante avantaĝon al ili? Do, ili perdis la emon de rezistado kaj en la tempo de arabaj atakoj eĉ disdonado de mono inter ili ne persvadis ilin al batalo, Ĉar sprito dumlonge lacigita kaj frakasita ne ripareblas per tuja kuracado.

Eta rigardo al oficiala relegio de Sasanida ŝtato

La oficiala relegio de sasanida ŝtato estis Zoroastrismo, kiu nia-opinie estis trovinta ĉefan diferencon kun la relegio, kiun la Zoroastro mem la irana profeto alportis-Kio siavice postulas apartan debaton.

La Zoroastrismo de Sasanida epoko kiel la mez-epoka kristanismo eklezia, intervenadis en tutan vivon de la

popolo kaj eniris en ĉiujn angulojn de la homaj vivoj. Ili ŝanĝadis la leĝojn kaj relegiajn dekretojn laŭ siaj deziroj. La religio de spiritoj obstine subtenis kaj konfirmis la kategoriojn de la tavolo-sistemo kaj kontraŭi tion estis kalkulata kiel granda peko. Ili induktis al popoloj, ke la reĝo estas estaĵo Dia kaj eterna. La klabo anatema ĉiam estis levinta super la kapoj de kontraŭuloj. En lastaj tempoj de Sasanidoj pro la aperinta dubo pri la Zoroastra religio, du apartaj branĉoj ekaperis en Zoroastrismo: Zarvanidoj kaj Kjumarsidoj, ke por trakti ilin kaj ties apero-kialojn oni bezonas apartan studadon. La tuto de la aferoj kaj unuigo de la monda kaj religia mastroj kaj kaptigi homojn por atingi al volo siaj faris la popolon malpaciencaj kaj kor-rompitaj. Ili kvazaŭ atendadis por iu, ies voĉo aŭ mesaĝo, kiu komprenus ilin kiel homoj kaj ĝuigus ilin almenaŭ pri etrajtoj.

Pli antaŭe la strebemaj kontraŭstaroj de Manio (Manikeo), kaj Mazdao estis elformiĝintaj en tute apartaj cirkonstancoj, kaj tial la ŝtato povis kontraŭbatali ilin rigore, sed kvazaŭ tiu ĉi misio estis destinita realiĝi per islamo. laŭ la teoriistoj, eĉ se islamo ne estus aperinta, kristanismo prosperus en Irano. Islamo aperis ĝuste tiam, kiam Arabujo estis droninta en krizojn de idoladorado kaj diseco kaj ne havis alian alternativon krom adori Dion kaj fariĝi unueca, kaj precize tiam, kiam ankaŭ Irano pro la diversaj problemoj kaj vasta dekadenco ne povis rezisti kontraŭ la arabaj atakoj.

La atako de Arabaj muzulmanoj al Irano

En la komenco de islamo, kiam araboj alfrontis al irananoj de Sasanida periodo, ili male de Irano kio spertis krizajn politikojn, ĝuis fortikan kaj centralizitan ŝtaton en Madineo (Medino) kun viglaj soldatoj plen-

motivaj. Ili anstataŭ la iranaj kredaj krizoj havis firman kredon kaj unuecan religion. Eĉ la malmultaj armiloj kaj ekipaĵoj al ili estis avantaĝo por pli facile plenumi la milit- kaj forkurmanieron antaŭ la pezaj armeanoj Sasanidaj.

La atakoj de araboj havis multajn kialojn. eble la leteroj senditaj de la profeto en sia vivo al ĉefoj de diversaj landoj indikis, ke la islama religio estas monda religio kaj li havas mision disvastigan kaj eblas ke arabaj motivoj por ekmovi al Irano estis plenumi la volon de la profeto. Laŭ la administra vidpunkto de la kalifo, la atako al najbaraj landoj kiel Irano eblus malhelpi la arabojn de sendiĝo kaj malkonsentiĝo. Aliflanke la pliiĝo de muzulmanaj nombroj en Arabujo kaj ilia senlaboreco povus okazigi multajn daĝerojn inter la ĵus naskita islamo, do, la danĝero devus esti iamaniere translokita eksteren. Ankaŭ la disvastigo de islamo kaj monoteismo povus esti unu el la kaŭzoj de la atako, ĉar kiam la homo atingas al nova kredo laŭ si perfekta, volas altiri ankaŭ la aliajn kaj entute estas naïve pretervidi la ekonomiajn kialojn, povrecon kaj malsaton de araboj kaj la penson pri la akirado de la trofeoj.

Do, sekve de la faktoroj numbritaj pri irana situacio, t.e.: "La kriza politika situacio, ekonomia dekadenco, finacaj premadoj, kriza socio, tavolo kasto, la kreda krizo kaj displitiĝo de la relegio, malmulta aparta grupo monopoliganto, la armeo kaj korpuso laca, eluzita kaj trista pri la milito, kaj popoloj malkontentaj kaj maltrankvilaj pri la ŝtato" ni pravigu al Sasanida ŝtato facile disfali antaŭ la araboj. Eblas, ke se anstataŭ araboj aliaj atakus, ankoraŭ la sasanida ŝtato disfalus. Laŭ unu el la historiistoj:" La sasanida ŝtato similis al la mortinta Solejmano (Salomono) apoginta al bastono sia kaj nur skueto sufiĉis renversigi lin (ĝin).

Ne la tuta muzulmanaro kaj atakantoj aliris al Irano por disvastigi islamon, kompreneble la grupoj, kiuj unuafoje venis, vere celis tion sed, kelkaj aliaj araboj forrabistaj por facila rabado sin enmiksitis en la atakantojn kaj ĝuis el venkaj fruktoj sennumbraj.

Laŭ la interpretoj menciitaj, Fakte Irano ne rezistis aŭ ne povis rezisti antaŭ la arabaj atakoj kaj en kelkaj lokoj venkiĝis per milito kaj masakro kaj en kelkaj per paco kaj negocado, sed kelkaj regionoj de la lando kiel la nordo de Irano tre malfrue ĉirkaŭ la 2a aŭ eĉ 3a arcentoj post la heĝiro estis venkitaj.

La islamo de irano

Post la venko de Irano fare muzulmanoj, la irananoj ne unu-foje, sed iom post iom akceptis islamon. Nature kelkaj premate en milito muzulmaniĝis, kies nombroj estis malmultaj kaj grupoj el altaj tavoloj por gardi siajn profitojn kaj ne perdi ilin akompanis la muzulmanojn. En konkerado de la urboj, muzulmanoj unue alvokis la popolojn al islamaniĝo kaj poste (se ili tion ne akceptis) al pagado de ĝezjeo(imposto, kion kredantaj neislamanoj devas pagi al la islama ŝtato, en kiu ili loĝas) kaj fine (se ili ne akceptis pagi tion)al batalo. Do, la afero ne estis tiel, ke ĉiuj homoj perforte islamaniĝu, ĉar la fontoj indikas pri la plu-ekzistado de sanktaj fajrejoj antikvaj (de zoroastranoj) kun multe da klientaro en la 2a kaj 3a heĝiraj jarcentoj en diversaj regionoj de la lando.

La kialon de muzulmaniĝo de iranoj oni devas priserĉi en islamo mem kaj en la internaj problemoj de Zoroastra religio mem. La Zoroastro de Sasanida epoko eble povis esti kontentiga en la komencaj periodoj de la regado de sasanidoj, sed post pasado de la jaroj pro la popola renkotiĝo kun la pensoj de kristanoj, judoj, buddistoj,

maniĥeanoj, mazdaoj kaj filozofiaj ideoj estiĝis ŝanĝo en iliaj pensmanieroj. La dualismo rezulte de ada konflikto inter Ahura-Mazdao kaj Ahrimano (satano) pliigis la mensan disecon de la popolo. Kelkaj por transformi la dualecon al unueco fondis la branĉon de Zarvanismo aŭ Zarvanidoj. Laŭ tio la Zarvano, la Dio eterna estas la patro de Ahura kaj Ahrimano. Pli poste pro la duboj pri tiu religio aperis alia religio nome Kiumarsismo aŭ Kiumarsidoj. Entute tiuj ĉi diskutoj postulas teknikajn kaj implikitajn debatojn. Koncize oni povas diri, tiuj ĉi religiaj branĉiĝoj indikas pri la kredaj krizoj, kiuj ne harmonias kun la evoluantaj kaj progresintaj pensoj de la popolo.

Male kiam venis islamo kaj la popolo konatiĝis kun tio, ties Dio havis tiujn ĉi specifojn:

”Estis ĉio pova, ne havis rivalon rezisti antaŭ li kaj batali kontraŭ li, ne estis naskita kaj ne estis naskinta, ne aŭskultis nur al paroloj de sprituloj, religiuloj kaj reĝoj, sed atentis al ĉiuj homoj kaj antaŭ ĉiu demando-signo havis indan respondon, do, Allah anstatavis Ahuraon kaj Zarvanon..

La originala islamo kaj ne tio, kio poste fariĝis ornamita kaj eltranĉita kaj ilo en la manoj de la regantoj dispotaj, havis mesaĝon pri la egaleco kaj kontraŭis ĉian tavolan diskriminacion kaj ĉiuj homoj de reĝo ĝis la servistoj kaj simplaj vilaĝanoj egalas ĉe tio kaj tio por irananoj, kiuj dum jarcentoj estis implikitaj en tavolo pimateco estis tre stranga kaj interesa, ke alvenis relegio, kiu egalestigas ilin kun la imperiestro.

La ordonoj de originala islamo, malpermesis la tiranecon kaj rekomendis la donacon, egalecon kaj antaŭenigis kulturon por kolopodi al edukado kaj lernado al ĉiuj tavoloj de la socio (pretervidante la tavolan kaj materian superecon male de Zoroastriso

en Sasanida epoko, kiu la superecon vidis en materia ĝuado).

Laŭ kelkaj, irananoj por forkuri el pagado de ĝezjeo, musulmaniĝis. Tio ne estas ĝusta, ĉar islamaniginte ili devus pagi duopan imposton, tio estas Zakaton* kaj Homson*. do, anstataŭ unu forpago, du forpagojn ili devus pagi, do la realan kialon de musulmaniĝo de irananoj oni devas serĉi en menciitaj sociaj kaj pensaj kondiĉoj.

Ĉiu-kaze, irananoj post la akcepto de islamo fariĝis muzulmanoj stabilaj kaj seriozaj kaj liveris pli da servoj ol la araboj al islamo kaj havis grandan rolon en fondado de brila islama civilizacio. Pli ol duono de la sciensistoj de la islama periodo estas el Irano kaj per rigardo sincera kaj justa, ni vidas, ke la nivelo de scienco kaj ties disvatiĝo neniel kompareblas kun la antaŭ-islama erao kaj tio montras, ke plimulto da popoloj musulmaniĝis memvole, ĉar kiam oni kredas sub la perforto, neniam okupas sin servi al la religio kaj oni ne devancas la alportintojn de la religio. Ekzistas tradicio de la profeto-kio malgraŭ la ĝusteco aŭ malĝusteco-ŝajnas interesa: li diris al siaj kunuloj: “Mi vidas tagon, kiam tiuj ĉi irananoj batalos kontraŭ vi por muzulmanigi vin.”

- (1) *Fama reĝo sasanida*
- (2) *Zakato: Almozo*
- (3) *Ĥomso: Kvinono de la imposto*

Fonto :

SOLTANI. R. *eslam va iranian (Islamo kaj Irananoj)* Negahe tazeĥ, literatura, kultura, arta sezon-letero, numero 20 kaj 21 vintro 1380 kaj printempo 1381 eldonita en Beheshti universitato.

Tradukis: **M.Fahmi**

Soltanieh Aliĝis la UNESKO-Liston de

En sia sesio en Durban, SudAfriko, Monda Heredaĵo Komitato aprobis inkluzivi Soltanieh kupolon kiel la sepa Irana ejo en la listo de monda heredaĵo.

Tehrano -Julio 15 2005(CHN)-
Soltanieh kupolo , la plej granda el tiaj
konstruaĵoj en la mondo kiu estas farita
el briko, estis aprobita esti registrita sur
la UNESKO listo de Monda Heredaĵo
hodiaŭ. Ĉi tiu decido estis farita en la
hodiaŭa (Vendredo) sesio de Monda
Heredaĵo Komitato renkontiĝo. Tiele la
kupolo fariĝis la sepan Iranan ejon
registrita sur la listo de UNESKO
Monda Heredaĵo.

”Gajnninte la plej parton de
voĉdonoj post la livero de ICOMUS
s p e r t u l a
raporto sur
S o l t a n i e h
dosiero, ĉi tiu
antikva Irana
kupolo estis
lokita sur la
listo de
U N E S K O
M o n d a
Heredaĵo en la
hodiaŭa sesio
de la Monda
H e r e d a ĵ o
K o m i t a t o
renkontiĝo,
kiu estis
dediĉita al
registriĝo de

nomita antikvaj kaj arkeologiaj ejoj kaj
objektoj sur la listo de Monda
Heredaĵo,” diris Ahmad Ĝalali, la Irana
Ambasadoro al UNESKO.

”Soltanieh estas la simbolo de unu
el la plej gloraj periodoj de Irana
historio,” aldonis Ĝalali, “kaj ĝia
registriĝo sur la monda heredaĵo listo
konfirmas ĝian internacian gravecon.”

Soltanieh kupolo kun alteco kiu
superas 54 metrojn estas unu el la plej
mirindaj pecoj de arkitekturo de
“Ilĥanida” (Mongolo dinastio regita



Foto: M. R. Torabi

Iranon) epoko. La konstruado de ĉi tiu antikva monumento kiu estas situata 30 kilometroj for de Zanĝano, provinca ĉefurbo en okcidente de Irano, datiĝas ekde 700 jaroj antaŭe. Ĉi tiu kupolo kun sia ok-angula bazo, ravega kahela laboro, kaj imponega arkitekturo estas unu el la plej unikaj ekzemploj de Islama arkitekturo.

Soltanieh estas la plej grava ekzemplo de Ilhanida arkitekturo, kiu verŝajne influis la arkitekturon de multaj aliaj historiaj konstruaĵoj en Irano,” diris Sejjed Mohammad Beheŝti, la vic-direktoro de Irana Kultura Heredaĵo kaj Turisma Organizo Esplor-Centro, “ĉi tiu kupolo estas la plej granda en la mondo kiu estas farita el briko kaj pri ĝia alteco estas la tria plej alta inter similaj en la mondo.”

Li indikis, “Registriĝon de Iranaj ejoj montras la gravecon de la rolo de ĉi tiu lando en la internacia kunteksto.” Post la registriĝo de Soltanieh sur la Monda Heredaĵo listo, la prezidanto de Monda Heredaĵo Centro, Francesco Bandarin, kaj Muniro Buŝenaki, UNESKO kultura vicdirektoro gratulis la Iranan delegacion aparte.

Antaŭ ĉi tiuj renkontiĝoj, en lia vizito al Irano lastan februaron, Buŝenaki priskribis la kondiĉon de Soltanieh dosiero por registriĝo kiel “Favora”.

Li asertis, “la Irana parto transdonis kompletan dosieron pri ĉi tiu ejo kaj estas tre neverŝajna ke la registriĝ-procedo de Soltanieh havus iun malhelpon.”

Soltanieh kupolo estas la sepa Irana ejo kiu estas registrita en la listo de Monda Heredaĵo post Naqŝ’e Ĝahan Palaco, Perspoliso, Ĉoĝa Zambil zigorat (ofta formo de mult-tavola templo en

antikva Elamo), Taht’e Solejman, Pasargado, kaj Arg’e Bam (Bam citadelo). Estante agnoskita per la Monda Heredaĵo Komitato, kiu traktas kaj prizorgas la registriĝo sur UNESKO listo de Monda Heredaĵo, metos la ejon sub protekto kaj konservo de preskaŭ ĉiuj landoj tutmonda.

La 29-a ĉiujaraj renkontiĝoj de Monda Heredaĵo Komitato komencis dimanĉon (Julion 10) en Durban, SudAfriko, kaj daŭris ĝis sekvanta Dimanĉo (Julio 17). pli ol 700 spertuloj de proksimume 180 landoj ĉeestis ĉi tiuj renkontiĝoj kiuj celas decidi pri la registriĝo de 42 historia, natura, kaj miksaj ejoj sur la listo de Monda Heredaĵo. Cetere, la supre menciita komitato estas respondeca stud(ad)i la kazon kaj kondiĉon de en-danĝera Monda Heredaĵo dum ĉi tiuj renkontiĝoj kaj decidi pri ili sekve.

Aktuale 788 ejoj estas registritaj sur la listo el kiuj 611 ejoj estas kulturaj, 154 estas naturaj, kaj 23 ejoj estas miksaj.

UNESKO 1973 konvencio por kultura kaj natura heredaĵo protekto kun 178 membroŝtatoj estas unu la plej disvastiĝintaj internaciaj konvencio. La membroŝtatoj de ĉi tiu konvencio estas respondecaj protekti kaj konservi mondajn heredaĵojn ejojn kaj objektojn kaj ankaŭ siaj propraj naciaj kaj regionaj kulturaj kaj naturaj ejoj.

En la ĉijara renkontiĝo, Sejjed Mohammad Beheŝti, la estro de Irana Kultura Heredaĵo kaj Turisma Organizo Esploro(j) Centro, prezidis la Iranan delegacion kiu konsistis el spertuloj kaj respondeculoj de Irana Kultura Heredaĵo Organizo.

La 4a Azia Kongreso

Razen Menandhar - Nepalo

Preparo

Azia Kongreso estis nia revo, kaj ankaŭ mia. Post kiam Bharat revenis el Koreio, kun la granda respondeco, mi multe ekscitiĝis. Iam mi pensis ke ni eble ne povos ĉar mi sciis ke mankas eĉ parolantoj, do denove venas alia penso por plenumigi la vakon - ne, ni havas sufiĉe da laborantoj kaj ni ankaŭ povas kreski novajn esperantistojn dum du jaroj.

Ni devas danki al Kim Yong Jin kiu de Koreio multe helpis nin kaj ankaŭ kuraĝigis nin. Li luis luksan ĉambron ĉe Thamel por ke ni daŭre laboru. Venis vizaĝoj en la oficejoj kiuj ne daŭre laboris dum la preparperiodo. Mi scias ke estis nur malmulte da homoj kiuj laboradis kaj ili certe multe laboris.

La atendo finiĝis kiam la dato finfine alvenis. Same kiel nepala kutimo, Nepala Esperanto-Asocio (NespA) faris Lokan Kongresan Komitaton kun pli ol 20 da membroj kaj denove "laborgrupo" estis kreita ĉar la NespA komprenis ke labori kun tiom granda teamo estis malfacila. Mi ĝojis ke min donis respondeco propagandi - tion mi certe volis fari.

Tagoj pasis; semajnoj, monatoj kaj eĉ jaroj pasis. Sed la laborrapideco estis same. Interese, dum kunvenoj, almenaŭ tiuj en kiuj mi partoprenis, ne okazis novajn gravajn decidojn. Oni dum horoj diskutis pri iu temo sed sen rezulto. Dio donis al ni du orelojn kaj unu buŝon sed en LKK, Bharat kaj Mukunda nur povas diri kaj tute ne aŭskulti. Mi estas silentema sed venis kelkaj homoj kiu ankoraŭ havas energion kritiki kaj esperi pli belan estonton - ili preskaŭ batalis sed la oreloj nur aŭskulti aŭ, kiel nepala proverbo diras - aŭskultis per unu orelo kaj forĵetis per alia.

Mi memoras, Hori Yasuo venis al Nepalo dum Himalaja Renkontiĝo kaj preskaŭ detale preparis la ĉiutagajn programojn. Sed la diskuto pri tio neniam finis (kaj daŭris ĝis la komenco de la kongreso mem) kaj pli interese, oni tre volis diskuti pri manĝaĵo kaj loĝado en hoteloj por "turistoj" sed ne pri temoj sur kiuj oni kongresu.

Kiel Dio volis, okazis nenomita puĉo en Nepalo kaj sekvis rompiĝo de telefonkontakto. Mi povas imagi ke KAEM kaj aliaj aliĝintoj timegis pro tio kaj tuj volis ke oni nuligu la kongreson (aŭ almenaŭ prokrastu). NespA mem ne povis decidi kion fari kaj KAEM ĝustatempe prokrastis. Nepalanoj eĉ ne havis senton - ĉu konsenti aŭ diri ke Nepalo tute taŭgas okazigi la kongreson.

Kreiĝis granda ĥaoso post kiam Libera

Folio donis longan novaĝon pri la prokrasto. Kiel ĵurnalisto, tio plaĉis al mi sed kiel LKK-ano, mi trovis ke ĝi troigis la novaĝon.

Antaŭkongreso

Alvenes la tagon de la planita Azia Kongreso kaj ankaŭ atingis al Nepalo tiuj kiuj aliĝis al la AK kaj ne volis aŭ ne povis nuligi iliajn vojaĝojn al Nepalo. Kelkaj el ili eĉ diris ke ili venis malgraŭ la protesto de la ŝtato kaj ankaŭ de siaj familianoj. Ege interese. Estis pli ol 20 kaj mi inter ili konis Franziskan, Miĉikon kaj aliajn.

Kongreso okazis - mi ne estis certa ĉu estis vera aŭ antaŭigita. Plej parte ili babilis pri la "sukceso de kongreso" dum la kongreso kaj ne temis pri io. La organizanto petis al partoprenantoj paroli pri la kongreso kaj ili ne havis vortojn. Ili ankaŭ kantis en nepala lingvo kaj iomete dancis. Sed tie mankis Esperanteco - ili ne povis diskuti pri Esperanto- movado ĝenerale, nek povis ili diskuti pri la movado en Azio aŭ Nepalo. Venis aferoj pri religio kaj lingvoj do mi ne povis plu resti silenta. Mi volis klarigi kiel la granda grupo trudas malgrandajn grupojn. Kaj preskaŭ alvenis bataleto inter nepalanoj - mi diris ke aliaj lingvoj ne rajtas ekzisti en registaro kaj Mukunda protestis, dirante ke "ili" ankaŭ "rajtas" instrui sian lingvon en lernejoj. Pli ol tio, mi multe esperis ke oni diskutu pri kaj ideologiaj kaj praktikaj temoj - ekz, komerco, politiko, religio, socio, homaj rajtoj, reto, UEA ktp. Sed mi nur povis aŭdi iomete pri Monda Turismo.

Azia Kongreso

Venis tempo por la prokrastita Azia Kongreso mem. Okazis LKK-kunvenoj sed tute freneze. Unu tagon, mi vizitis LKK-oficejon je 12.00 sabate kaj poste Bharat diris al mi - "Vi povas veni je la 3.00 se vi volas, okazos la LKK-kunveno."

Nur antaŭ unu semajno, Bharat parolis pri la Kongresa Libro al mi kaj mi akceptis la respondeco de ĝia eldono. Mi certe diris ke povus esti pli bone se iu alia laborus. Bharat donis al mi la materialon por prepari la Kongresan Libron. Mi kunportis ĝin, pensante ke li laboras tuttage; li devas fari ion por ĝi. Sed ho ve !; kiam mi malfermis la disketon, mi vidis ke nur estis salutmesaĝoj de Landaj Asocioj kaj nomlisto de partoprenantoj.

Bone, mi iel verkis, kompilis kaj tradukis la materialon por ĝi kaj mankis denove; finfine ni finis en tri tagojn kaj iris al la presejo kaj ni miris ke Mukunda jam kompilis

pli ol 100-paĝan libron. Kaj Bharat tuj diris al ni ke en la asocio, Mukunda neniam parolis pri tia afero. Li ankaŭ diris ke kiam ajn oni eldonas libron nome de la asocio, li aŭ ŝi devas proponi tion en la estrara kunveno kaj la estraro decidus ĉu la libro meritas eldono aŭ ne. Li pravas.

25-a de aŭgusto (ĵaŭdo)

Mi estis ĉe la halo antaŭ la akceptado komenciĝis. Mi salutis al s-ro Hori kaj tiam venis mia vera ĝojo kiam mi ekvidis s-inon Doi, s-non Tahira kaj s-ron Kido. Post 11 jaroj, ili bone konis min.



Mi petis permeson ke mi elsendu aktualajn novaĵojn pri la AK per reto. Mi jam faris bloĝojn www.aziakongreso.modblog.com kiu laŭ mi estas tre taŭga malmultekosta kaj rapida informdissendilo. Mi trovis la permeson. Do Kongresa Kuriero "Montejo" kaj la reta dissendilo estis mia respondeco. Mi vidis ke en LKK-oficejo en la hotelo haveblis komputilo kun retaliro. Mi pensis ke mia laboro estos tre rapida.

Okazis KAEM Kunsido kun la LKK-anoj. Mi vidis nur kelke da LKK-anoj dum la kunveno. Hori klarigis ke la inaŭgura programo estos preciza kaj okazos en Esperanto krom prelego de registara oficisto. La LKK konsistas el 23 membroj, sed mi vidis ke nur kelkaj partoprenis.

Mi demandis pri la deviga prokrasto kiu parte kaŭzis tiel ke venis malpli multe da partoprenantoj ol oni komence planis. Esperanto en Azio iam raportis ke estos 225 kongresanoj – sed ne venis respondo de KAEM. Eble ili ne volis diskuti pri tiu afero. Venis nur 40 gesamideanoj el ses landoj kaj pli ol 60 Nepalanoj aliĝis. 20 estis volontuloj.

Estis Japanoj la plej multe, eble kvar el Barato, unu el Vjetnamio. Du ĉininoj venis sed ili ne estis kongresanoj, nur raportistoj. Ne venis eĉ unusola kongresanto el Koreio, kie okazis la pasinta AK kun centoj da partoprenantoj. Kaj mi ne ankaŭ vidis reprezentantojn de Irano, Pakistano, Tajlando kaj aliaj landoj.

Poste venis tempo por bankedo, kie venis preskaŭ ĉiuj eksterlandaj kongresanoj kaj

kelke da nepalanoj. Mi parolis kun Doi kaj Tahira kaj do alvenis A Giridhar. Li aspektis pli juna ol mi imagis kaj li parolis tre rapide kaj ĝuste.

Tahira diris al mi ke la unua numero de Kongrea Kuriero (Montejo) devas esti eldonita dum la unua tago, por ke la kongresanoj havu imagon pri la programoj aŭ programŝanĝoj. Mi perdis la ŝancon eldoni ĝin. Sekvis interkona vespero kie oni prezentis kantetojn aŭ alian artaĵon. De Nepalo, junulinoj prezentis nepalajn kantojn kaj dancojn.

Nepre estis tre interesa sed mi tre volis elsendi la plej fruan novaĵon al la reto per la bloĝejo. Unue ĝi funkciis sed vespere tion mi ne povis fari. Mi perdis mian partoprenon al la naica vespero kaj denove ne sukcesis dissendi la novaĵon.

26-a de aŭgusto (venderdo)

Unuafoje en Nepalo okazis tiel publika manifestacio de Esperanto surstrate. Estis tre artifika organizo – kun la armea ĉevalĉaro kaj ankaŭ la Panĉebaja. La preterpasantoj mire rigardadis al la grupo kaj ankaŭ demandis la nepalanojn pri kio temis. Kvar kongresanoj, inkluzive de Hori sidis sur la ĉevalĉaro - la evento ankaŭ estis honoro por la gravaj partoprenantoj de la kongreso. Hori esprimis ke tio estis "grandioza kaj senvorta" organizo, dum la inaŭgura ceremonio. Ni kongresanoj trapasis la Reĝan Palacon kun la esperanta skribaĵoj.

Post tio okazis la "solena" inaŭguro. Ministro por kulturo Buddhi Raj Bajracharya estis invitita por tio. Li alvenis duon horo malfrue (tio estas kutimo en Nepalo). Same kiel ĉiam okazas en Nepalaj Esperanto eventoj, Mukunda invitis homojn - ne esperantistojn - kiujn li konis. Kaj la programo estis preskaŭ en nepala lingvo kaj la programmastro Bharat tradukis gravajn anoncojn en Esperanto! Purna Suresh, la esperantisto el Barato prezentis dancon je la fino.

Mi iris ekstere por fine eldoni la Montejon kaj ankaŭ por elmeti fotojn el mia fotilo al la bloĝejo. Mi ne povis ĉar la fotoj iris al la reto tre malrapide kaj fuŝis. Mi sukcesis iel eldoni Montejon, kiu estas la kongresa kuriero.

Post la teda ceremonio estis tempo por teo kaj oni devis multe atendi por sia vico. Ja estis aro da homoj. Mi ne povis kompreni kial tiom multe da homoj, kompeneble neesperantisto estis invititaj dum la inaŭguro – ĉu por montri al la eksterlandanoj ke troviĝas tiom multe da esperantistoj en Nepalo? Dum la tagmanĝo okazis same.

Fakkunsidoj

Estis la unua tago de kongreso kaj plena je fakkunsidoj. Post tagmanĝo, okazis sep fakkunsidoj en tri haloj. Estis longaj kaj mallongaj, estis seriozaj kaj gajaj – sed ĉie estis partoprenantoj kaj ili ĝuis la kunsidojn.

1. Mukunda Pathik instruis nepalan lingvon al partoprenantoj; estis kvar aŭ kvin lennitaj.
2. Ajit Joshi kaj aliaj junuloj instruis nepalajn kantojn. Ili kantis "Resham Firiri" kaj la Baratanoj bone lernis.

3. Okazis instruado de Esperanto por komencantoj.
4. Razen Manandhar prelegis pri la evoluo de la Budhismo kaj ĝia aktuala pozicio en la naskiĝlando de Budho. Estis pli ol 12 homoj kaj ili kurioze demandis pri la religio-politiko de Nepalo.
5. Saiko Tume diskutis pri stato de virinoj en aziaj landoj, dum virina fakkunsido. Nur Japanio kaj Ĉinio povis paroli pri virinoj en siaj landoj. Mi ne ĉeestis sed mi aŭdis ke eĉ nepalaj virinoj ne ĉeestis. Ili diskutis pri la graveco de egalaj rajtoj kaj kunlaboro kun la virinoj.
6. Tahira Masako instruis al progresantoj. Ĉar miksiĝis komencantoj, ili ne bone povis lerni pri pli malfacilaj ekzercoj.
7. Hori Yasuo Hasuo prelegis pri la historio de Japanio.

27-a de aŭgusto (sabato)

1. Matene komenciĝis la plej grava fakkunsido pri azia agado – estis frue kaj nur malmulte da homoj venis. Hori kondukis ĝin. Esperantistoj de ĉiuj landoj (nome Japanio, Ĉinio, Vjetnamio, Aŭstralio, kiu helpis prezenti pri Ĉinio, kaj Nepalo) kiuj okupiĝas aŭ interesiĝas pri movado partoprenis. Kaj do estis la plej granda laŭ la nombro de partoprenantoj ankaŭ – estis ĉirkaŭ 30. Estis tri-hora kaj komence oni pensis ke estos tro longa sed poste la tempo mankis kaj oni rapide iris al la konkludoj. La tri horoj ne sufiĉis por la diskutado kiu ekscitigis la partoprenantojn kaj ankaŭ donis sanĉon al ili lerni pri azia agado.

Estis dividita la kunsido en tri partoj:

a. Dum unua parto estis pri movadaj aferoj. La reprezentantoj prezentis koncizajn raportojn pri la situacio de la Esperantomovado en siaj landoj. Mi lernis ke en Japanio kaj Ĉinio, maljunuloj abundas sed en aliaj landoj junuloj kreskas. Kvankam Esperanto venis ĉirkaŭ antaŭ unu jarcento almenaŭ en kelke da aziaj landoj, la evoluo de ĝi estis ne kontentiga en multaj alaj landoj (krom Japanio kaj Ĉinio). La partoprenantoj diris ke la evoluo en tiuj aliaj landoj, ne tuŝita antaŭ longe, nun kreskas rapide.

b. Poste oni diskutis pri la movadaj aferoj laŭteme.

i. Oni parolis pri sia Esperanto-oficejo. La landoj pli malpli mankas stabilajn oficejojn kaj opinias ke la movado ne firme antaŭen iras sen propra oficejo.

ii. Kotizo-kolektado ja estas grava afero sen kio la landa asocio ne povas glate funkcii. Nature, oni ne mem kun intereso pagas ĝin sed devas esti lerte kolektita kaj samtempe devas esti klara kie la monon estas uzata. Eldono de organo povas esti efika metodo por kolekti kotizon.

iii. Ĉiuj landoj ofte-malofte instruas Esperanton kaj ofte okazas tiel ke komence multaj homoj lernas ĝin kaj ĉesas uzi ĝin poste. Koresponda instruado kaj perretaj kursoj ankaŭ estas fruktodona metodo nuntempe, laŭ la partoprenantoj. Venis Chol Nath el Nepalo por prezenti pri la instruado de

Esperanto, mirinde!

